

V-23562/2 (1938)

ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Vol. 2, N-ro 6

Junio 1938

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.



Ingeniero J. R. G. ISBRUCKER
Prezidanto de Esperantista
Lingva Komitato kaj Akademio

Nederlandano, naskita la 19-an de julio 1889 en Hago. Esperantisto de 1909. Konata aganto en la movado nacia kaj internacia. Verkinto kaj tradukinto de pluraj libroj. Prezidis la 12-an Universalan Kongreson de Esperanto en Hago 1920.

EL STATUTARO DE LA LINGVA KOMITATO.

Celo :

Art. 1. — La Esperantista Lingva Komitato estas komisiita por zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la Lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon.

Lingvaj problemoj

La Kongreso de Boulogne-sur-mer, unua manifestacio de internacia esperantista vivo, fondis provizoran « lingvan komitaton », kies nomon oni tiam, verŝajne pro ĝia provizoreco, skribis ankoraŭ kun malgrandaj komencliteroj. Per tio realiĝis deziro, jam de longe esprimita de D-ro Zamenhof, ke la Esperantistoj per la fondo de iu rajtigita komitato prenu mem la sorton de la lingvo en siajn manojn. En la Kongreso de Genève, la sekvantan jaron, la Lingva Komitato ricevis definitive sian oficialecon, ornamis sin per grandaj komencliteroj kaj estis la unua el la multaj komitatoj, kiujn la esperantista mondo de tiam vidis naskiĝi, vivi aŭ morti... Ĝia modesta simbolo L.K. preskaŭ kaŝiĝis inter la multaj literkombinoj, kiuj en la daŭro de 33 jaroj ofte nebuligis la mensan horizonton de novaj adeptoj de la mond-lingvo, sed ĝi restis kaj daŭris kaj hodiaŭ povas esti fiera pro sia plej respektinda ĝo inter la esperantistaj komitatoj. Kun la Akademio, fondita en ĝi en 1908 kiel pli facile manipulebla, ĉar pli malgranda komitato, ĝi plenumas sian rolon kaj prizorgas sian taskon, asignitan al ĝi de la unua artikolo de ĝia Statuto: « La Esperantista Lingva Komitato estas komisiita por zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la Lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon ».

La fakto, ke mi antaŭ ne longe prenis sur min la prezidantecon de la L.K. (la legantoj permesu al mi plue uzi tiun mallongigon, jam familiaran al la publiko), igis min iom mediti pri tiu tasko kaj pri la maniero, en kiu la L.K. plenumis kaj plenumas ĝin, ne ĉiam sen kritiko kaj sen riproĉoj pro nesufiĉa agemo.

Eble tiuj riproĉoj ne estis tute justaj por komitato, kiu devas konservi kaj

kontroli, havas do taskon pli pasivan ol aktivan. Konservi la fundamentajn principojn de Esperanto oni ja ne povas, kiel oni tenas valorpapirojn en monŝranko. Kaj ĉu la L.K. devas kiel kontrolisto de la lingvo-evoluo kapti ĉe la oreloj ĉiun uzanton de neologismoj, kiuj ne plaĉas al ĝi? La tereno de Esperanto estas vasta kaj la katenoj de la Fundamento ne premas forte, tiel ke la liberaj kaj liberemaj Esperantistoj povas permesi al si multajn kapriolojn antaŭ ol ili ĉesas meriti la nomon de adeptoj de la Zamenhofa lingvo. En tiaj cirkonstancoj estas utile, de la L.K. kaj la Akademio estu iom konservativaj kaj ne tro facile cedu al la deziro enkonduki novaĵojn. Kion do fari, se la prezidanto mem... sed, ne, al tiu tragedio mi revenos poste.

Kiel mi jam diris, mi meditis pri la tasko de la L.K. kaj mi demandis al mi, kiel nia centra lingva institucio povas plenumi sian rolon de kontrolanto kaj gvidanto en lingvaj aferoj. Ne povante esti reala ĝendarmo, ĝi almenaŭ de tempo al tempo povas aŭdigi sian admonan voĉon, kiel paŝtisto revoki la ŝafojn, kiuj inkliniĝas iri proprajn vojojn. Kompreneble la parabolo estas iom kripla kiel ĉiuj paraboloj, ĉar mankas la minacantaj dentoj de la fidela paŝtista hundo, kiuj devigas, kie admono ne helpas.

Kaj mi pensis, ke eble estas bone, ke la prezidanto de la L.K. donu en tiu rilato la ekzemplon, ke li komprenu kiel parton de sia tasko, observi la uzadon de la lingvo en la daŭro de la jaroj kaj doni pri ĝi sian opinion kaj sian konsilon al ĉiuj, kiuj bonvolos aŭskulti. Jes, mi volas doni mian opinion pri kelkaj aferoj, kiuj ŝajnas al mi gravaj kaj eĉ interesaj, sed mi devas tuj akcenti, ke tio estas privata opinio, kiun mi ne povas kovri per la mantelo de la oficiala aŭto-

ritateco, eĉ kvankam mi entreprenas ĉi tiun aferon en la rolo, kiun donis al mi mia nova posteno. Kiel ofte Zamenhof deklaris, ke eĉ liaj respondoj en lingvaj aferoj neniel povas esti devigaj por la publiko, sed devas esti rigardataj nur kiel opinio de privata Esperantisto. Ĉu do iu povus arogi al si aŭtoritatecon, kiun eĉ la aŭtoro de Esperanto tiel modeste rifuzis? Cetere tiu principo havas por mi la avantaĝon, ke mi multe pli libere povas esprimi mian opinion, kiun mi volas bazi sur sincera fideleco al la Fundamento kaj sur severe logika rezonado.

★

Unua problemo, kiu prezentas sin, ĉar jam de kelkaj jaroj ĝi movis la animojn, estas la elparolado de Esperanto. Mi devas tuj diri, ke tiu problemo ŝajnas al mi ne tro grava, ĉar jam de multaj jaroj dum kongresoj kaj vojaĝoj Esperanto estas parolata inter plej diversaj nacioj kaj neniam iaj nuancoj, kiuj sendube estas konstateblaj, kaŭzis seriozajn miskomprenojn. Sed la principo: « unu litero, unu sono », uzata kiel glora argumento por la artefarita lingvo en la batalo kontraŭ la nekredema ekstera mondo, aŭdigas siajn postulojn kaj la homoj deziras scii, precipe la novaj adeptoj, kiu do estas la ĝusta elparolo de tiuj 28 filinoj de Kadmos, kiuj formas la Esperantan alfabeton? Rilate al tiu demando oni ne devas forgesi, ke la ĉefa afero en la lingvo estas la vortoj kaj ke la literoj estas nur helpiloj por fari bildojn, laŭ kiuj oni povas rekoni la vortojn. Elparolante vorton, ni ne elparolas apartajn literojn, sed produktas kombinaĵon de sonoj, en kiu la diversaj literoj neeviteble influas unu la alian. Por doni konkretan ekzemplon ni konsideru la elparoladon de la vorto « sango » kaj tiam ni facile konstatas, ke neniu elparolas vere « san-go », sed ke la litero « n » estas forte modifata de la sekvanta « g » kaj ricevas nazan sonon. Tio estas evidente sekvo de la konstruo de niaj parolorganoj, sed ĝi kaŭzas en la praktiko neniun malfacilaĵon. Simile ni povas sperti, ke en diversaj landoj de Eŭropo la litero « l » estas elparolata en almenaŭ 4 diversaj manieroj kaj tiujn samajn elparolojn ni do retrovas en Esperanto. Sed, ĉu ili kaŭzas iun miskomprenon?

Jam en la Kongreso de Boulogne-sur-mer oni demandis al Zamenhof, ĉu oni devas elparoli la literon « r » gorĝe aŭ lange kaj al tio la majstro tre saĝe respondis, ke, ĉar multaj personoj ne povas elparoli tiun literon laŭ unu el la du nomitaj manieroj, ĉiu elparolu ĝin laŭ sia eblo kaj el tio neniu malhelpo sekvas. Mi opinias, ke tio estas la ĝusta principo: ni ne devas klopodi difini por ĉiu litero matematike precizan elparolon, al kiu devus adaptiĝi la langoj de ĉiuj diversnaciaj Esperantistoj, sed plene

sufiĉas, se la elparolo de ĉiu litero restu inter certaj limoj, kiuj garantias, ke konfuzo ne povas okazi kaj ke oni ne povas intermiksi la diversajn sonojn.

Eĉ pli grava ol por la konsonantoj tiu principo estas por la vokaloj, ĉar estas pri la elparolado de la vokaloj, ke ekzistas la plej multaj duboj. Kaj estas inter tiuj vokaloj precipe la « e » kaj la « o », kiuj kaŭzis eĉ diskutojn kaj disputojn. Estas rimarkinde, ke en multaj naciaj lingvoj tiuj du literoj havas almenaŭ du diversajn elparolojn, kiujn oni distingas kiel « fermitan » kaj « malfermitan » laŭ tio, ĉu la buŝo dum la parolo estas pli aŭ malpli fermita. Krom tio oni rimarkas, ke en per konsonanto fermita silabo la du vokaloj havas sian « malfermitan » elparolon, dum en malfermitaj silaboj, do kiam la silabo finiĝas per vokalo, tiu ĉi estas elparolata en « fermita » maniero. Mi supozas — eble la fonetikistoj povas doni pli da lumo en ĉi tiu afero — ke tiu fenomeno havas naturan kaŭzon. Dum la parolado oni malfermas la buŝon por la vokaloj kaj ĝenerale la lipoj tuŝas sin ĉe la konsonantoj. La fermado de la buŝo do ĉiam formas la transiron al sekvanta silabo. Sed se ne estas konsonanto ĉe la fino de la silabo, la lipoj tamen jam al-

proksimiĝas kaj la vokalo de la malfermita silabo estas elparolata pli fermite. Ĉu tiu teorio estas ĝusta aŭ ne, por la momento ne estas grave. Fakte estas, ke, se oni sekvas tiun sistemon de parolado ankaŭ en Esperanto, oni ricevas multe pli naturan kaj belsonan elparoladon ol kiam oni sekvas la konsilon de tiuj, kiuj obstine, eĉ kelkfoje fanatike, deziras, ke oni elparolu la « e » kaj la « o » nur « malfermite ». Precipe al kelkaj el miaj samlandanoj mi volas pri tio direkti admonan konsilon. Inter alilandanoj oni feliĉe ne tiagrade renkontas tiun laŭ mia gusto tre malbelan elparoladon de Esperanto.

Estas la granda merito de Zamenhof, ke li malebligis konfuzon, eĉ se la sama vokalo ne ĉiam estas elparolata ekzakte en la sama maniero. Li donis al Esperanto nur kvin vokalojn kaj ne distingis inter diversaj parolmanieroj de unu sama vokalo, kiaj ekzistas en naciaj lingvoj. Se ni distingas bone inter tiuj kvin vokaloj, tute ne estas grave, ĉu oni elparolas ilin kun certaj nuancoj. Miskompreno ne povas sekvi el tio kaj la pli libera kaj natura elparolo donas ornamon kaj koloron al la Esperantaj vortoj.

En la elparolado de la literoj, ambaŭ



Nederlandanoj scias aranĝi kongresojn.

Dum la nederlandaj Esperanto-kongresoj (kongresoj de LEEN) oni bone laboras sed ankaŭ bone festas kaj amuziĝas. Efektive, nederlandanoj scias aranĝi siajn kongresojn. Supre kelkaj bildoj el la ĵus pasinta 10-a Kongreso de LEEN, kiu okazis dum pasko en Amsterdam, kun ekskurso al famaj Marken kaj Volendam. — Supre maldekstre: Profesoro Böss montras siajn « sorĉaĵojn », per ili propaĝandante Esperanton (sabatvespere); dekstre: « Miss Esperanto » (s-ino Mabesoone) kantas la himnon, kaj ĉiuj kunkantas (fino de la revuo prezentita paskodimanche). Malsupre maldekstre: Junkoraj maljunaj fervoruloj (s-ro Hoope el Leiden kaj s-ro Holleman el Bergen-op-Zoom) kun du ĉarmaj fraŭlinoj el Volendam; kaj dekstre: Volendamaj knabinoj jam bone amikiĝis kun gekongresanoj (s-ino Tetterode el Hago, s-ro v. d. Vegt kaj f-ino Schalk el Rotterdam). — La suprajn fotojn afable disponigis f-ino Kramer el Arnhem, la malsuprajn s-ro Mooij el Hago.

de vokaloj kaj de konsonantoj, oni povas sekvi du principojn, kiujn mi volas distingi kiel sistemon « elastan » kaj sistemon « rigidan ». Laŭ la elasta sistemo oni lasu iom da libereco, zorgante, ke la limoj inter la diversaj literoj restu klare distingeblaj. Laŭ la rigida sistemo oni devus elparoli ĉiujn literojn ĉiam kaj ĉie en ekzakte sama maniero. Por nacia lingvo la rigida sistemo eble estas bona por atingi normon de civilizita elparolado, sed por internacia lingvo, al kiu tiom da diversaj naciaj langoj devas adaptiĝi, nur la elasta sistemo ŝajnas praktike uzebla.

★

Mi ĉiam opiniis, ke estos utile, ke la Akademio flanke de sia pli pasiva tasko, entreprenu ankaŭ pli pozitivan laboron. Kaj komencante per la komenco mi elektis por ĝi la prilaboron de la fundamentaj konstruistoj de la lingvo, nome de ĝia vortrezoro. La bazon por ĉiuj vortaroj formas la « Universala Vortaro », parto de la « Fundamento de Esperanto », en kiu Zamenhof donis la liston de la radikoj kaj aliaj vortelementoj de Esperanto kun iliaj tradukoj en kvin lingvoj. Tiu listo, poste plivastigita per kelkaj tiel nomataj « Oficialaj Aldonoj de la Akademio », formas la kernon de nia vortprovizo, ĉirkaŭ kiu ĉiuj naciaj kaj internaciaj vortaristoj konstruis siajn vortarojn.

La difino de la signifo de vortoj per tradukoj en naciaj lingvoj havas kelkajn malavantaĝojn, kiuj sekvas el la fakto, ke ofte la signifo de internacie uzata radiko ne estas precize la sama en diversaj lingvoj. En la komenco ne ekzistis por Zamenhof alia rimedo por fiksi la signifojn de la vortoj, sed poste, kiam Esperanto jam evoluis al memstara lingvo, oni sentis la bezonon posedi vortaron, en kiu ĉiu vorto estu difinata per la rimedoj de la lingvo mem. Unua grava provo en tiu direkto estis la en 1909 aperinta « Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca » de Boirac, la unua prezidanto de la L. K. Pioniran laboron en tiu kampo faris ankaŭ Kabe, kiu en 1911 en sia konata vortaro donis la difinojn de ĉiuj tiam oficialaj kaj de multaj neoficialaj radikoj kaj de multaj kunmetitaj vortoj. Similan rolon kiel tiu vortaro de Kabe nun plenumas la « Plena Vortaro », eldonita de S.A.T., kiu en pli granda amplekso montras la saman aranĝon.

Al ĉiuj tiuj meritplenaj verkoj mankis verdire nur unu afero, nome la stampo de la oficialeco, kiun povus doni nur la centra lingva institucio de la movado, kaj kiu povus alporti decidon en ĉiuj dubaj kazoj, kiam opinioj de privataj vortaristoj povas stari unu kontraŭ la alia. Neniel malgrandigante la meritojn de tiuj privataj vortaristoj, mi tamen esperas, ke iam ni povos posedi « Plenan

Vortaron de la Akademio », kiu estos la oficiala kaj fidinda bazo por ĉiu difino de Esperanta vorto, sed mi bone konscias, ke la vojo al tiu fincelo estas ankoraŭ longa. Sed kial ni ne povus komenci en modesta skalo la preparon de tia vortarego, aranĝante la procedon tiel, ke jam baldaŭ ni povos liveri ion konkretan al la publiko. Estas pro tio, ke mi proponis komenci per la starigo de listo de la difinoj de ĉiuj vortelementoj entenataj en la Universala Vortaro de Zamenhof kaj en ĝiaj 6 Oficialaj Aldonoj. Se ni povos eldoni tiun liston, ni jam havos unuan bazon, sur kiu ni povos facile konstrui plu. En sekvontaj eldonoj ni povos aldoni novajn signifojn

kaj nuancojn, aliajn ĝis tiam ne oficialajn radikojn, difinojn pri kunmetitaj vortoj, ekzemplojn, unualoke tiritajn el la verkoj de Zamenhof ktp. kaj iom post iom la vortaro elkreskos al vera klasika verko.

Iniciatante ĉi tiun laboron mi komprenis, ke ne unu aŭ kelkaj homoj povus bone plenumi ĝin kaj tial mi alvokis la helpojn eĉ de ĉiuj Esperantistoj, kiuj bonvolos subteni la Akademion per siaj konsiloj. Unua listo de cent difinoj jam aperis en la gazetaro, kaj de multaj flankoj ni ricevis la petitan kaj ŝatatan kunlaboron.

(Finota.)

I. J. R. G. Isbrücker.

Instruaj faktoj

Pri la angla-itala interkonsento la franca teksto grave diferencas de la angla.

En la gazeto de Paris: « Le Matin », troviĝas la sekvanta artikolo pri la protokolo de la kunsido de la anglaj kaj francaj ministroj, kiu ĵus okazis en Londono:

« ... Pri la anglo-itala interkonsento la angla teksto estas: „ **The french ministers welcomed this contribution to European appeasement...** „, kies traduko devus esti: „ Les ministres français ont considéré comme la bienvenue cette contribution à l'apaisement européen „; dum la franca teksto estas: „ **Les ministres français ont approuvé cette contribution...** „ Sekve la angla teksto estas pli varma ol la franca. »

Pli grava ol tiu nuanco estas la diferenco inter la tekstoj, ĉar, laŭ la franca teksto, ŝajnas, ke la francaj ministroj rajtus aprobi aŭ malaprobi agon de la angla registaro; dum la angla teksto diras nur ke ili plezure konstatis tiun agon. Feliĉe la anglaj ne komprenas la francan tekston, kiu povus prave ofendi ilin.

« ... Pri la centra Eŭropo, la angla teksto parolas nur pri la ago entreprenota, ... por trovi bazon (**find the basis**) de paca kaj justa solvo de la problemoj ekzistantaj en tiu regiono, dum la franca teksto parolas pri certigado de tiu solvo (**assurer la solution**)... »

Do la anglaj ministroj serĉas la solvon, dum la francaj, kiuj trovis ĝin, opinias ke ĝi devas esti aplikata.

En la du temoj estis miskompreno malgraŭ ĝisfunda deziro interkompreniĝi; kvankam ne-grava, ĝi pruvas utilecon de Esperanto, kiu nur povas forigi tiujn, danĝerajn en eblaj okazoj, erarojn, en la diplomataj kunsidoj.

★

Angla universitata profesoro skribas al pola scienca revuo pri sia sperto en internaciaj kongresoj.

Grava revuo « Organon », internacia revuo dediĉita al la « Scienco de la Scienco », eldonata de la Instituto Mianowski por Kuraĝigo de Sciencaj Laboroj en Varsovio, sendis antaŭ unu jaro demandaron pri la organizo de internaciaj kongresoj al multaj spertuloj en diversaj

landoj. La respondoj estas nun publikigitaj en la revuo (volumo II, 1938, paĝoj 133-236). Post la demandoj precizaj oni invitis notojn pri la ĝenerala aranĝo. La sekvanta citaĵo estas respondo al tiu invito, sendita al la nomita revuo de s-ro C. B. Fawcett, « Professor of Geography, University College », Londono.

Mia sperto en multaj kongresoj internaciaj, pri geografio kaj najbaraj fakoj, min konvinkas pri la senutileco de diverslingvaj diskutadoj. lometo da homoj scipovas fremdan lingvon sufiĉe bone por uzi ĝin kompetente dum la viva interŝanĝo de vigla diskutado. Tial, fakte, diverslingva diskutado ĝenerale iĝas grupo da apartaj, kaj multokaze ne tre rilataj, kontribuajtoj al la temo.

Tiu ĉi opinio estas fortigita de komparo kun unulingvaj kongresoj, en Britlando kaj Usono, en kiuj mi spertis valorajn kaj viglajn diskutadojn.

Tial mi volas sugesti al organizontoj pri kooperado internacia scienca ke ili studu la eblon de unu konsentota komuna lingvo por kongresoj. Evidente oni ne povas, en la hodiaŭa mondo naciisma, doni tian rangon al iu ajn nacian lingvo. Komuna lingvo akceptebla al scienculoj devas esti neŭtrala lingvo. La sola efektiva lingvo en tiu ĉi kategorio estas Esperanto. Mi iom studis ĝin, pensante pri tiu ĉi celo; kaj mi estas konvinkita ke ĝi indas la seriozan atenton de ĉiuj kiuj deziras antaŭenhelpi la kooperadon intelekta inter la diversaj popoloj de la mondo.

★

Komplika procedo ĉe litovaj-polaj traktadoj.

Litova samideano sendis al ni eltondaĵon el ĵurnalo « XX Amzius », n-ro 96 (551) de 30.4.1938, kun traduko de jena paragrafo pri la litovaj-polaj traktadoj:

En Kaunas laboradis du litovaj-polaj komisionoj: a) pri poŝta, b) pri telefona, telegrafa kaj radia komunikado. Oni interkonsilis preskaŭ ekskluzive france kaj, de tempo al tempo, estis uzataj germana kaj rusa lingvoj. La 30-an de aprilo la komisionoj trarigardis la france skribitajn tekstojn kaj tradukis ilin litoven kaj polen.

Unueco estas Forto

Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

Oficiala Informilo

Oficiala Informilo

N-ro 76. 4-an de Majo, 1938.

NOVAJ DELEGITOJ.

Argentino.
Vicente A. Echeverria (Santa Fe). — D.: F. De María, (F.C.C.C.)

Ĉeĥoslovakujo.
Potštejn. — D: L. Berger, N-ro 72.

Nederlando.
Roosendaal (Noord-Brabant). — FD. (Impostaj aferoj): A. Ebbinge, Brugstraat 49.

Norvegujo.
Sandnes (Rogaland). — D: J. Ellingsen, Storgaten 49.

Usono.
Duquesne (Pennsylvania). — D: I. L. Kinney, 38, First National Bank Building.

ŜANĜOJ.

Brazilo.
Ĉefdelegito — nova adreso: S-ro Mario Braga, Hotel Engert, ap. 48, Nova Friburgo (Est. Rio).

Aŭstralio.
Hamilton. — Provizore ne estas D. pro translokigo.

Italujo.
Foligno. — Provizore ne estas D. pro translokigo.

Jugoslavujo.
Beograd. — FD. (Arbarkulturo ktp.): M. B. Eric, nova adreso: Zahmuska ul. 28/1, apt. 7

Polujo.
Brzesc n/B. — Provizore ne estas D. pro morto de samideano Demidowicz.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

119. S-ro A. Cotton, Sèvres, Francujo.
120. S-ro F. L. Wharff, Los Angeles, Usono.

MONATA STATISTIKO.

Membraro.

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Aprilo, 1938, kaj ankaŭ (por komparo) ĝis la fino de Aprilo, 1937.

	Aprilo 1938.	Aprilo 1937.
AM	4197	4218
MJ	928	738
MA	865	809
MAH	283	231
MS	121	131
PAT.	7	12
DM	72	73
HM	29	31
Sumo	6502	6743

Korespondantoj.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Aprilo, 1938:

Ricevitaj	705
Senditaj	1251
	1956

UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO 1938.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 1286 el 26 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

N-ro 77. 12-an de Majo, 1938.

NOVAJ DELEGITOJ.

Swan Hill (Victoria). — D: F. Chamberlain, 749, Campbell Street.

Britujo.
Harrow (Middlesex). D: E. D. Durrant, 263-a, Kings Court, Alexandra Avenue.
London. — FD. (Naturkuracado): R.K. Hurgon, 106, South Hill Park, N.W. 3.

Francujo.
Le Havre (Seine-Inférieure). — D: J. Laborde, 4, rue Montesquieu.

Nederlando.
Schiedam (Zuid-Holland). — VD: H. C. Luyke, Rembrandtlaan 22.

ADRESOSANĜOJ.

Britujo.
London. — FD. (Konstruaĵoj): A. Venture, « Erewton », Lilian Road, S.W. 16.

Danujo.
Aarhus (Jylland). — D: J. Christoffersen, de Mezasvej 23.

Francujo.
Romans (Drôme). — VD: R. Domergue, 64, rue Saint-Nicolas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

119. F-ino A. Waite, Birmingham, Anglujo.
120. J. J. Boutwood, Hastings, Anglujo.
121. E. Archdeacon, St. Cloud, Francujo.

UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO, 1938.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 1301 el 27 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

Oficiala Informilo

N-ro 78. 19-an de Majo, 1938.

NOVAJ DELEGITOJ.

Argentino.
Punta Alta (F.C.S.). — D: S-ino S. Farberoff, Pasco 318.

Britujo.
Ipswich (Suffolk). — FD. (Bankaj Aferoj): F. N. Blythe, 103, Leopold Road.
FD. (Skoltismo): F. D. Murphy, 65, Tuddenham Road.

Rickmansworth (Hertfordshire). — FD. (Libro-Komerco): F-ino E. C. Goldsmith, Esperanto House, Heronsgate.

Hispanujo.
Barcelona. — FD. (Terokulturo kaj Muziko): F. Martí Temprado, Str. Trilla 4-3.

ŜANĜOJ.

Argentino.
Buenos Aires. — D. (antaŭe VD): G. B. López, El Rastreador 360.

Britujo.

Hawick. — D. (nova adreso): W. T. Samuel, c/o Mrs. Dawson, 1, Park Terrace.

Nederlando.

Leeuwarden. — Provizore ne estas VD.

MEMBRO-SUBTENANTO.

122. O. Walder, Bern, Svisujo.

C. C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

INTERNACIA KONKURSO 1938.

Stato je la 30a de aprilo 1938.

	POENTOJ		
	1937	1938	%
1. Jugoslavujo	257	592	230.3
2. Svislando	137	283	206.6
3. Bulgarujo	92	181	196.7
4. Polujo	318	544	171.1
5. Finnlando	61	102	167.2
6. Latvujo	55	91	165.5
7. Litovujo	135	154	114.1
8. Belgujo	1722	1528	88.7
9. Kanado	74	64	86.5
10. Aŭstralio	429	364	84.8
11. Nederlando	2837	2334	82.3
12. Britujo	6483	5230	80.7
13. Portugalujo	317	243	76.6
14. Sud-Ameriko	851	642	75.4
15. Hungarujo	619	459	74.2
16. Usono	1513	1057	69.6
17. Francujo	5907	3937	66.6
18. Nov-Zelando	265	162	61.1
19. Ĉeĥoslovakujo	2449	1441	58.8
20. Afriko	137	79	57.6
21. Danujo	1118	633	56.6
22. Rumanujo	50	27	54.0
23. Svedujo	3024	1592	52.3
24. Italujo	636	309	48.6
25. Aŭstrujo	789	306	38.8
26. Norvegujo	792	303	38.2
27. Azio	1321	461	34.8
28. Grekujo	137	—	—
	32525	23118	71.1

Meza%

La kontraŭuloj asertas

ke Esperanto ĉefe estas afero de kluboj, kaj ne de la ĝenerala vivo. Nu, multaj objektoj postulantaj studadon estas pli malpli afero de kluboj, ekzemple la stenografio. Ankaŭ naciajn lingvojn oni flegas fremdlande en specialaj lingvokluboj. Kaj tio okazas malgraŭ la fakto ke stenografio kaj naciaj lingvoj estas jam vaste instruataj en lernejoj, dum al Esperanto ĝis nun la lernejoj plejgrandparte restas ŝlositaj. Kun sia pli kaj pli granda disvastiĝo Esperanto laŭgrade ĉesos esti afero ĉefe de kluboj kaj laŭgrade enpenetros la ĝeneralan vivon, ĝis kiam ĝi estos, finfine, konkerinta ĝin plene.



OFICIALA INFORMILO N-RO 5.

Kotizoj. — De nun la kongreskotizo estas £ 1-10-0. La edzo aŭ edzino de kongresano, kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj pagas po 15 ŝil. Pagiloj estu pageblaj al Internacia Esperanto-Ligo.

Loĝejoj kaj Ekskursoj. — Mendiĵoj estas jam senditaj al kongresanoj, kaj pliaj ekzempleroj estas haveblaj ĉe la kongresoficejo. La komitato ne povas garantiĵi loĝadon aŭ partoprenon en ekskurso al kongresano, kiu ne plenumas la kondiĉojn.

Programo. — La provizora programo jam aperis, kaj ni esperas sendi la kongreslibron al kongresanoj en junio. La jenaj novaj sciigoj, tamen, sendube interesos la legantojn:

Dimanĉo. — Multaj restoracioj en Londono estas fermitaj dimanĉe. Ni tial aranĝis komunan tagmanĝon por mil kongresanoj en Lyons' Oxford Corner House, tuj kontraŭ la Dominion Theatre, kie okazos la Solena Inaŭguro. La kosto estos 2ŝ. 6p., kaj biletoj estos haveblaj en la kongresejo tuj post via alveno en Londono. La ceteraj kongresanoj povos tagmanĝi en aliaj restoracioj sufiĉe proksime.

La Diservo okazos en The City Temple, granda preĝejo atingebla en dek minutoj de la restoracio supre-menciita. La Diservon kondukos Pastro W. H. Downes, bone konata kaj sperta angla samideano.

La Teatraĵo okazos lunde kaj marde en la Scala Theatre, Charlotte Street, W.1. tute proksime al la kongresejo. Ĝi estos komedio: «Eliza Restas» kiun prezentos la Neilson-Terry Guild of Dramatic Art, kies membroj nun kun aparta sukceso lernas Esperanton en Cseh-metoda kurso de f-ino Saxl. Duono de la kongresanoj ĉeestos la teatraĵon lunde, kaj duono marde. Je tiuj du tagoj, la kongresanoj, kiuj ne estos en la teatro, povos ĉeesti filmprezentadon en la kongresejo.

Balo. — La kongresa balo okazos Ĵaŭdon, en Alexandra Palace, kelkajn kilometrojn norde de la centro. Specialaj vagonaroj portos la kongresanojn al kaj de la balsalono. Bonvolu laŭeble kunporti nacian kostumon!

Vendredon vespere okazos nova aranĝo, kiu, ni opinias, plaĉos al la kongresanoj. En la Central Hall, Westminster, — unu el la plei grandaj koncertejoj en Londono — aro da tre lertaj infanoj el la Nacia Hejmaro kaj Orfejo por Infanoj prezentos al la kongresanoj allogan programon de kantoj, dancoj, kant-teatraĵetoj, korp-ekzercoj ktp.

Fakaj Kunsidoj estas aranĝitaj por Skoltoj, Bahaanoj, T.A.G.E., Katolikoj, Kvakeroj, la Unuigita Komitato por Impostoj laŭ la Valoro de la Tero, I.S.A.E., Komercio, K.E.L.I., Turismo, Aviado.

La kunsido aranĝata de la Kvakeroj estas granda kunveno sub la titolo «La Nuna Mondstato: Kiel Povas Esperanto Hodiaŭ Pliaj Bone Helpi al Mondfrateco kaj Internacia Paco». Inter la parolantoj estos D-ro Edmond Privat.

Karavanoj. — Krom la jam anonciitaj, oni aranĝas la jenajn karavanojn:

Italujo: Itala Esperanto-Federacio, Galleria Vitt. Emanuele 92, Milano.

Nederlando: J. Telling, Schietbaanlaan 106a, Rotterdam.

Membraro. — Ĝis hodiaŭ (8-4-1938) aliĝis al la kongreso 1235 el 26 landoj.

Blindula Kaso. — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por ebligi al blinduloj

partoprenadon en la kongreso. Jam ricevita: £ 32-6-2.

F-ino E. Ashby, 118, Selly Park Road, Selly Park, Birmingham, Anglujo, organizas budon en la kongresejo, kie ŝi vendos diversajn objektojn por helpi al la Blindula Kaso. Tiu, kiuj havas, aŭ povos pretigi taŭgajn aĵojn por tiu celo, estas petataj skribi al f-ino Ashby.

Donacoj al la Kongresa Kaso. — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por helpi al la plena sukceso de la kongreso. Donacoj jam ricevitaj: £ 21-12-6.

Presajoj. — En la kongresejo kaj kongresaj kunvenoj oni rajtos disdoni cirkulerojn kaj ĉiajn aliajn presajojn nur post antaŭa aprobo de la kongresa komitato.

Dokumentaro. — La sama postulo rilatas al presajoj disdonotaj kun la oficialaj kongresdokumentoj; tio estas, ili devos ricevi la antaŭan aprobon de la komitato kaj devos alveni ĉe adreso indikota, plej malfrue du semajnojn antaŭ la kongreso.

Adreso por leteroj. — Sekretario, 30a Universal Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Por la Organiza Komitato,
Cecil C. Goldsmith, Sekretario.

✱

La belaj kongres-glumarkoj estas ankoraŭ

haveblaj ĉe la kongres-oficejo po 6 pencoj aŭ 2 internaciaj respondkuponoj por 50.

Poŝtkartoj de la Kongresejo estas haveblaj po 3 por unu penco, plus afranko, aŭ 12 por du respondkuponoj, afrankite.

✱

Antaŭkongreso en Newcastle.

Ĵaŭdon, la 28-an de julio, okazos en la urbo Newcastle (nord-orienta Anglujo) alloga antaŭkongreso. Tiu aranĝo devus aparte interesi kongresanojn el la skandinavaj landoj, kiuj tre oportune povos vojaĝi al Londono tra Newcastle, kiun oni atingas per ŝipaj linioj de Bergen, k.a.

Karavano el Norvegujo jam decidis ĉeesti la antaŭkongreson, kaj ĝis nun la sekvantaj eroj de la programo estas aranĝitaj: Ĵaŭdon, je la 11-a horo, aŭto-ekkurso al Hexham kaj la historia Roma Muro, kun lunĉo en Hexham. Vespere la saman tagon okazos komuna manĝo kaj festo en la County Hotel, Newcastle, kaj la postan matenon oni ekiros al Londono je 10.30, kaj alvenos je 16.00. La tuta kosto (laŭ la hotelo elektota) estos inter 16 ŝil. kaj 21 ŝil.

Aliĝojn oni sendu al IEL-Delegito A. R. Fairbairn, Burnaby Lodge, Ryton-on-Tyne, Anglujo.

Oka listo de kongresanoj

- 32. H.W. Hetzel, Philadelphia, Usono.
- 33. K.T. Hansen, Gentofte, Danujo.
- 34. D-ro A. Zamenhof, Warszawa, Polujo.
- 35. S-ino W. Zamenhof, Warszawa, Polujo.
- 36. L. Zamenhof, Warszawa, Polujo.
- 37. F-ino L. Zamenhof, Warszawa, Polujo.
- 38. D-rino Z. Zamenhof, Warszawa, Polujo.

- 1251. F-ino A. Kraay, Den Haag, Nederlando.
- 1252. F-ino M. Willey, Teignmouth, Anglujo.
- 1253. J. Thompson, Gateshead-on-Tyne, Angl.
- 1254. S-ino J. Hyslop, Ilford, Anglujo.
- 1255. F-ino A. Karlsen, Oslo, Norvegujo.
- 1256. F-ino H. Augestad, Oslo, Norvegujo.
- 1257. F-ino W. N. Newton, London, Anglujo.
- 1258. M. Darnault, Paris, Francujo.
- 1259. H. Polge, Besançon, Francujo.
- 1260. J. Martinet, Thouan-le-Petit, Francujo.
- 1261. J. Graham, Carlisle, Skotlando.
- 1262. R.W. Hanlan, Newcastle-on-Tyne, Angl.
- 1263. Thv. Hansen, Oslo, Norvegujo.
- 1264. Trygve Hansen, Oslo, Norvegujo.
- 1265. Prof. J. Loth, Warszawa, Polujo.
- 1267. S-ino W. Lothowa, Warszawa, Polujo.
- 1268. W. Majewski, Warszawa, Polujo.
- 1269. S-ino I. Chwialkowska, Łódź, Polujo.
- 1270. F-ino W. Soltysik, Lwów, Polujo.
- 1271. F-ino H. Gryglasowna, Łódź, Polujo.
- 1272. F-ino C. Bolton, Nottingham, Anglujo.
- 1273. L. Alseika, Ukmergė, Litovujo.
- 1274. F-ino M.M. Alseikaitė, Ukmergė, Litov.
- 1275. A. Sifico, Uccle, Belgujo.
- 1276. S-ino Sifico, Uccle, Belgujo.
- 1277. F-ino S. Nylén, Örebro, Svedujo.
- 1278. N. G. Ahlm, Stockholm, Svedujo.
- 1279. S-ino A. Sjösten, Örebro, Svedujo.
- 1280. F-ino E. R. Mitchell, Eastbourne, Angl.
- 1281. F-ino E. Richardsron, Nottingham, Angl.
- 1282. F-ino W. v. d. Meer, Leeuwarden, Ned.
- 1283. R.H. Fletcher, Nottingham, Anglujo.
- 1284. F-ino G. Barlow, Bishop Auckland, Angl.
- 1285. F-ino E. Auger, London, Anglujo.
- 1286. F-ino E. Ball, London, Anglujo.
- 1287. F-ino M. Bearder, London, Anglujo.
- 1288. F-ino E.E. Branton, Shepperton, Anglujo.
- 1289. D. Byrne, Dublin, Irlando.
- 1290. F-ino R. Byrne, Dublin, Irlando.
- 1291. S-ino E. Gerstner, Vac, Hungarujo.
- 1292. F-ino A.L. Lackland, Stockholm, Sved.
- 1293. A. Larsson, Näsvisken, Svedujo.

- 1294. F-ino E. Lobb, Shepperton, Anglujo.
- 1295. S-ino R. Lobb, Shepperton, Anglujo.
- 1296. F-ino H. Oestrom, Stockholm, Svedujo.
- 1297. F-ino B. Schlund, London, Anglujo.
- 1298. F-ino M. Smit, Rotterdam, Nederlando.
- 1299. F-ino E. Green, St. Leonards-on-Sea, A.
- 1300. F-ino A.N. Maund, Barnet, Anglujo.

Laŭlanda Statistiko de la Aliĝintoj:

Anglujo, 787; Aŭstralio, 2; Aŭstrujo, 3; Belgujo, 43; Brazilo, 3; Ĉeĥoslovakujo, 19; Danujo, 8; Egiptujo, 3; Finnlando, 6; Francujo, 90; Germanujo, 4; Hispanujo, 2; Hungarujo, 2; Irlando, 4; Italujo, 14; Jugoslavujo, 1; Kanado, 4; Kimrujo, 10; Litovujo, 2; Nederlando, 68; Norvegujo, 24; Polujo, 25; Rumanujo, 1; Skotlando, 64; Svedujo, 80; Svislando, 5; Usono, 14.

Entute 1288 el 27 landoj.

La kontraŭuloj asertas

ke Esperanto jam mortis. Ili publikigas eĉ nekrologojn pri ĝi. Jen la deziro estas la «patro de la ideo». Ĉar ili d e z i r a s ke Esperanto estu mortinta, ili deklaras ĝin tia. Antaŭe la samaj kontraŭuloj klopodis per silentado pri la internacia lingvo malhelpi ĝian disvastiĝadon kaj akceli ĝian mortigon. Vidinte, ke malgraŭ ĝia prisilentado Esperanto disvastiĝas kaj tute ne montras simptomojn pri baldaŭa morto, ili d e k l a r a s ĝin mortinta. Kompren-eble, ankaŭ tio ne helpas. Efektivan progreson oni ne povas haltigi per pri-silentado aŭ mortdeklaro. Ĝi ja venk-atingos, kaj ĝi tre vive ankoraŭ daŭros, kiam ĝiaj mortdeklarintoj kun sia mal-vasta horizonto delonge estos putrintaj en siaj tomboj.

La Esperanto-Kongreso dum 1938

Parolante pri la Esperanto-kongresoj, oni pensas unuavice pri la *Universala Esperanto-Kongreso*, kiu (la 30-a) nunjare okazos en London (30 julio ĝis 6 aŭgusto), organizita de IEL. Aliaj internaciaj Esperanto-kongresoj estos tiuj de *IKUE* (katolika) en Ljubljana, Jugoslavio (6-12 aŭg.) kaj de *SAT* (laborista) en Bruxelles (7-13 aŭg.).

La plej grava ne-internacia Esperanto-kongreso laborista certe fariĝos tiu de *FLE* (Federacio de Lab. Esperantistoj) en la nederlanda lingvo-teritorio) en Leeuwarden. Ĝi okazos je pentekosto (5-6 junio). Adreso: Brinkman, Poppegweg 20, Leeuwarden, Nederlando. — La nomita federacio estas unu el la plej vigle kaj plej laŭcele laborantaj organizoj esperantistaj.

Same je pentekosto okazos la jenaj kongresoj de landaj Esperanto-asocioj: la kongreso de *Belga Ligo Esperantista*

en Charleroi; tiu de *Brita Esperantista Asocio en Glasgow*; *Centra Dana Esperantista Ligo* kunvenos en Naestved, *Flandra Ligo Esperantista* en Brugge, *Jugoslavia Esperanto-Ligo* en Novi-Sad, *Norvega Esperantista Ligo* en Oslo, *Societo Franca por la Propagando de Esperanto en Romans-Bourg de Péage*, *Sveda Esperantista Federacio en Arboga*.

La 2-3 junio kongresos *Hungara Esperanto-Federacio en Pécs*, la 1-3 julio *Esperanto-Asocio de Norda Ameriko en Cleveland (Ohio)*, la 16-18 julio *Bulgara Esperanto-Asocio en Sevlievo*, la 3-4 septembro *Itala Esperantista Federacio en Vicenza*.

Jam okazis la kongresoj de la *Esperanto-Asocio de ĈSR en Praha* (19-20 marto), de *Svisa Esperanto-Societo en Biel* (2 aprilo) kaj de *Nederlanda Esperanto-Asocio (LEEN) en Amsterdam* (paskon).

25-a Bulgara Esperanto-Kongreso en Sevlievo

La 25-a (Jubilea) Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio okazos en la pitoreska verda urbo Sevlievo, la 16-18 julio. Sevlievo, situanta proksimè de la legendea montaro Balkano, estas facile atingebla per aŭtomobilo, ĉar tra ĝi pasas la grava malnova ŝoseo de Sofia al Ruse kaj Varna. Ĉiutagaj aŭtobusoj ligas Sevlievon al la proksimaj fervojstacioj. La Sevlievanoj estas gastamaj kaj servemaj — tion ili montris dum la pasintjara turista kongreso en tiu urbo.

La vivo en Bulgarujo, kaj speciale en Sevlievo, estas tre malmultekosta, — por nederlandanoj, belgoj, francoj, germanoj k.a. eĉ ridinde malmultekosta. Post la kongreso oni aranĝos ekskursojn en ia pitoreska Balkano.

Por zorge aranĝota **Esperanto-ekspozicio** helpu tutmondaj gesamideanoj, per alsendo de leteroj, libroj, gazetoj, ilustritaj poŝtkartoj, fotoj el la esperantista vivo ktp., por ke la bulgaraj amikoj brave kaj fiere flirtigu la verdan standardon.

Informojn kaj ilustritan gvidfolion pri Sevlievo petu senpage de gimnazia profesoro **Simion St. Hesapčiev, Sevlievo, Bulgarujo**.

Novajo pri la 31a EANA-Kongreso:

EANA enkondukos novajn kongresajn ideojn

Antaŭlaboroj bone sukcesas.

La 31-a Kongreso de EANA okazos en la urbo Cleveland, centro de la Esperanto-vivo inter junuloj en Usono. Kutime la nordamerikaj kongresoj okazis je la semajnomezo; sed la venonta sin trovos je semajnofino, por ke tiuj, kiuj laboras, povu senĝene ĉeesti. La elektitaj tagoj estas 1-3 julio. Nova plano ankaŭ estos la Esperanto-diservo dimanĉon matene. Ĉefsidejo de la kongreso estos la granda hotelo « Al-lerton » kun grandaj naĝejo kaj festsalono. Neniama antaŭe okazis fakaj kunsidoj ĉe nordamerika kongreso, sed ĉi-jare la LKK ellaboris kompletajn planojn por fakakunsidoj de sciencistoj, instruistoj, studentoj, ktp. Ŝajnas ke tio estos la plej granda kongreso de EANA, ĉar neniama antaŭe tiom da kongresanoj aliĝis tiel longe antaŭ la kongrestagoj. La LKK donos belan paron da libro-starigiloj al ĉiu, kiu aliĝis antaŭ la fino de aprilo.

Ĉe la kongreso Lidja Zamenhof prezentos provlecionon, kaj la fama Cleveland'a urbestro prelegos.

18-a Kongreso de SAT en Bruselo

La 18-a Kongreso de SAT okazos la 7-13.8. 1938. en la « Popoldomo » en Bruselo. Kompare al antaŭaj kongresoj, la O.K.K. enregistris ĝis nun la plej altan aliĝnombro.

Rilate la loĝadon oni zorgas pri amasloĝejoj kaj tendejo, krom la kutimaj hoteloĝejoj kaj ĉekamarada gastado. Ne-SAT-anoj rajtas aliĝi kiel « gasto » je la samaj kondiĉoj kiel anoj. Ni supozas ke multaj esperantistoj profitos tiun okazon por viziti la ĉefurbon de Belgio kiu multe logas laŭ nia konstato. Gravaj rabatoj sur fervojo kaj sur ŝipo jam estas konsentitaj en Belgio, Francio, Nederlando, Svedio.

La kongreskotizo estas: 40 fk. belgaj (30 fk. por tiuj kiuj aliĝos antaŭ 1 junio); senlaboruloj pagos duonon de tiuj kotizoj.

Por informoj oni sin turnu al: L. Strainchamps, 148 Av. du Roi, Bruxelles. — Por aliĝo kaj pago al G. Basteels, 26 rue du Parnasse, Bruxelles, ĝirokonto: 332.15. Oni ankaŭ povas pagi per la kontoj de SAT en diversaj landoj. Koran bonvenon al ĉiuj! La O.K.K.



Stacidoma Esperanto-tabulo en Dunkerque.

Nun ankaŭ en Francujo oni komencis fiksi en stacidomoj Esperanto-tabulojn kun granda verda stelo kaj la nomo de la loka IEL-delegito. Dunkerque estas la unua franca urbo, kiu povas fieri pri tiu novaĵo. Nia bildo montras la Esperanto-tabulon en la stacidomo de Dunkerque. La tri samideanoj apud la tabulo estas: maldekstre, la delegito s-ro Lemoine; meze, vizitanto s-ro Praganon el Rumanujo; kaj dekstre, s-ro Houzé, inĝeniero, sekretario de la loka Esperanto-grupo. Espereble baldaŭ multaj aliaj francaj stacidomoj sekvos la ekzemplon de Dunkerque.

Universala Kongreso Bern 1939

Sub la titolo « Svisa Esperanto-Tago » (Biel, 3 aprilo 1938) aperis en la n-ro 461 de « Esperanto » (UEA, Genève, 15 aprilo 1938, p. 4) artikolo, kiu povas naski konfuzon pri la organizo de l' 31-a Universala Kongreso en Bern 1939. « La kunvenintaro » — diras la artikolo — « akceptis unuanime propono, ebligantan garantian por la kunigo de ĉiuj fortoj, kaj postulantan ke la Kongreso de Bern estu organizata de ambaŭ internaciaj Asocioj: de IEL kaj de UEA samrange, kaj ke la membroj de UEA ĝuu la samajn rajtojn kiel tiuj de IEL ». Ni legis kun surprizo tiun aserton, kiu nepre ŝajnas al ni esti eraro. Ni kaj aliaj partoprenintoj, kiujn ni demandis, ne memoras pri tia decido. En la oficiala protokolo, garantiita per la du subskriboj: de s-ro H. G. Rotach, antaŭa prezidanto de SES, prezidinto de tiu kunveno, — kaj de f-ino L. Meixler, antaŭa sekretariino de SES, protokolintino de tiu kunveno, — troviĝas pri tia decido absolute neniu mencio.

Fakte, la Estraro de IEL akceptis la inviton, okazigi la Universalan Kongreson en Bern, kun substrekado de l' frazo troviĝanta en la oficiala invit-skrivo: « akcepti, ke la kongreso estos gvidata ekskluzive de IEL kaj obei la kongresregularon de IEL ».

Profunde komprenante la necescon de unueco, klareco kaj disciplino en la esperantista movado, ni subskribintoj plene aliĝas al tiu kondiĉo. Oni rimarku, cetere, ke ne estas necese esti IEL-ano por partopreni Universalan Kongreson, kaj ke ĉiuj kongresanoj estas samrajtaj. Sed estu unu organizo kaj unu regularo: Unueco estas forto!

La honestecon de l'aŭtoro de l'artikolo « Svisa Esperanto-Tago » ni neniel pridubas. Sed la situacio estu klara!

W. Perrenoud, O. Walder,
(Prezidanto de SES) (Vic-prezidanto de SES)
F. Schmid,
(Antaŭa Vic-prez. de SES)

Kie libertempos la Esperantisto en somero 1938 ?

La aranĝoj en Malo-les-Bains.

Same kiel en 1935, 1936 kaj 1937, la Societo Franca por la Propagando de Esperanto komisiis al la Esperantista Grupo de Dunkerque (170 aktivaj membroj) la organizon de Perfektiga Kurso Konversacia en la kadro de Internacia Libertempa Semajno. Ĝi okazos la 3.-10.7.1938 en la belega marbanurbo Malo-les-Bains (kvazaŭ antaŭurbo de Dunkerque) en esperantista pensio-hotelo « Eole » mirinde situanta kontraŭ la maro kaj la promendo. La kurson gvidos sveda Cseh-instruisto Persson, konata pro siaj gravaj sukcesoj en Le Havre kaj sudorienta Francujo.

La 2.7. vespere kaj nokte okazos grande esperantista festo en la saĝonejo de la urbdomo. La 3.7. matene (dimanĉe) **oficiala inaŭguro de Zamenhofa Strato** kaj solena akcepto de la esperantistoj en la moderna urbdomo de Rosendaël. La 7.7. oni vizitos la havenon de Dunkerque sub gvidado de samideano, kiu estas ŝtata inĝeniero de la haveno (la tria haveno de Francujo). Krome okazos ĉiutage promenadoj, ludoj kaj la konataj marbordaj plezuroj. Oni povas banadi kiam ajn absolute senpage, sen rakso (eĉ sen kajut-elspezo, ĉar la hotelo estas tute ĉe la maro). La prezo estas tre favora: nur 270 francaj frankoj, inkluzive de plena pensio, trinkaĵoj, trinkmono kaj taksoj. Pliajn detalojn kaj senpagan gvidlibron oficialan de la banloko kun Esperanto-parto petu de la konstanta adreso: « **Esperanto-Dunkerque** », aŭ de s-ro inĝeniero Houzé, sekretario de la Esperantista Grupo, 121 rue G. Neuts, Malo (Nord), Francujo.

L. Bělohrad vokas.

En la « esperantista libertempejo » Lázně Bělohrad, kiu jam dum pluraj jaroj sukcesplene organizis amikan kunrestadon kaj diversajn kursojn, ankaŭ nunjare okazos (10.-24.7.):

1. Kurso por progresintoj, dum kiu oni parolos nur Esperante.

2. Kurso por Cseh-metodaj instruistoj.

3. Elementa Cseh-metoda kurso.

La kursoj okazos en la salonego de la urba konsilantaro kaj estos gvidataj de la konata rumana samideano D-ro S. Pragano. Kostoj por plena 14-taga pensio kaj kurzkotizoj de 600 ĝis 800 kronoj ĉeĥaj, eventuale malpli. Petu prospektojn kaj detalojn de: **Esperantista Klubo, Lázně Bělohrad, Ĉeĥoslovakio.**

La aranĝoj en Arnhem.

estas pli ampleksaj, kaj la pli multaj el ili okazos sub persona gvidado de pastro Andreo Cseh. La Esperanto-Domo kuŝas en bela parko, kaj ĝia hotelo por 50 gastoj estas instalita kun ĉiu moderna komforto. En la Esperanto-Domo estas aranĝataj studaj kaj amuzaj kunvenoj, kaj agrablaj ekskursoj al la belega ĉirkaŭaĵo.

La Esperanto-Domo en Arnhem estas la sola vera Esperanto-hotelo en la tuta mondo, kie ĉio: la domo, la estroj kaj la gastoj, do la tuta medio, estas vere esperantista. La esperantistaro povas fieri ke io tia en nia movado ekzistas, kaj ĝi devas partopreni en la klopodoj ke tiu unika entrepreno restu konservota kaj prosperu. Okazos la jenaj aranĝoj:

1. Kurso pri Esperanta literaturo, 27.-29.7. Gvidos S. Pragano. Kotizo 4 gld.

2. Vizito de dana karavano, 30.7.-8.8. La karavanon aranĝos H. Grönborg, Rosenvej 8, Risskov, Danlando, de kiu oni povas ricevi pli detalajn informojn.

3. Seminario por Cseh-metodaj instruistoj, 1.-6.8., kun prelegoj de A. Cseh, konsiloj al instruantoj, praktikaj prov-ekzemploj, raportado pri spertoj, diskutado, provlecionoj. Kotizo 6 gld., familiano 4 gld.

4. Ekzamenoj por Cseh-metodaj instruistoj, 6.8. La sukcesintoj ricevos specialan diplomon. Kotizo 5 gld.

5. Internacia perfektiga kurso, 8-13.8. Gvidanto: A. Cseh. Kotizo por ĉiuj lecionoj, prelegoj kaj amuzaj aranĝoj 6 gld., familiano 4 gld. Komuna kotizo por seminario kaj perfektiga kurso 10 (6) gld. Specialaj favoroj por PTT-istoj kaj geinstruistoj.

6. Esperanto-kurso por komencantoj, 15.-20.8. Gvidanto: A. Cseh. Kotizo 6 gld., familiano 4 gld. Favoroj por PTT-istoj kaj geinstruistoj.

Ĉiuj kursoj, prelegoj kaj amuzaj aranĝoj okazos en la Esperanto-Domo. La kursanoj povos loĝi en la hotelo de la domo mem: ĉambro kun tri manĝoj gld. 3.50, 3.— aŭ 2.—, servomono 10 %. Adreso por aliĝoj kaj petoj pri pli detalaj informoj: **Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando**

Denove al Danlando (Ry).

S-ro Harald Grönborg, kiu en la lastaj jaroj organizis la grandsukcesajn somerajn restadojn kun kursoj en Ry (70 partoprenantoj el 4 landoj) kaj en Fuglsø (160 partoprenantoj el 10 landoj), dum la somero de tiu ĉi jaro aranĝos la 3-an « **internacian lagordan restadon** ». Ĝi okazos en Ry (Danujo), en bela regiono kun lagoj kaj montetoj, de la 31-a de julio ĝis la 10-a de aŭgusto. Dum la restado okazos 3 diversgradaj Esperanto-kursoj: a) Komencakurso, Cseh-metoda; b) Daŭriga kurso, lernolibra metodo; c) Perfektiga kurso, speciale por geinstruistoj. En la kursoj la instruadon plenumos: s-ro Aug. Weide (el Germanujo), s-ino Weide (el Danujo), s-ro Kn. Aa. Andersen, s-ro H. E. Jensen, Toustrup, s-ro H. Grönborg.

Krom la kursoj okazos ankaŭ paroladoj en Esperanto pri internaciaj temoj, farotaj de: s-ro Uffe Hansen, s-ro H. E. Jensen, s-ro Johs. Terkelsen kaj aliaj esperantistoj.

La kursoj kaj kunvenoj, same la loĝado kaj manĝado de la partoprenantoj okazos en la granda popola altlernejo, kie estas loko por 200 personoj.

La kostoj de la restado: Kurskotizo 8 danaj kronoj. Plena pensio kostos por la 10-taga restado 32 aŭ 35 aŭ 40 dan. kronojn.

El Francujo, Belgujo kaj Nederlando oni povos vojaĝi al Ry plej malkare per la **autobusa karavano**, kiu ekiros el Leeuwarden (Nederlando) la 27-an de julio. La veturkosto al Danujo kaj reen estas 16 ned. guld. De Francujo kaj Belgujo oni povos vojaĝi malmultekoste en karavano ekde Bruselo al Leeuwarden. Informojn pri tiu karavano donas la aranĝanto s-ro T. Borsma, Hombekesche Steenweg 54, Mechelen, Belgujo.

Ilustritan prospekton kun ĉiuj detaloj oni povas ricevi de la organizantoj: s-ro H. Grönborg, Risskov, Danlando kaj s-ro G.H.M. Kat, Spoorstr., 142, Leeuwarden, Nederlando.

Antaŭ la Ry-restado s-ro Grönborg aranĝas internacian **3-tagan feri-restadon** en la agrikultura kaj mastrumada lernejo en **Risskov**, antaŭurbo de Aarhus, Danlando, 28-31.7. Plena pensio kostos por tago 5 dan. kronojn. De la lernejo oni ekskursos al vidindaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo kaj poste kune vojaĝos al Ry. Informojn donas s-ro H. Grönborg, Risskov, Danujo.

Refoje Helsingör (Danlando).

Denove en la venonta somero okazos la internaciaj ferijaj kursoj en la internacia altlernejo en Helsingör. Ke la esperantistaro tre ŝatas tiujn internaciajn kursojn kun ĝiaj eminentaj prelegantoj kaj geinstruistoj, kaj ke oni tre ŝatas ferian restadon inter multaj diverslandaj samideanoj en sincere amika atmosfero kaj en la tre alloga regiono, montras la fakto, ke la



F-ino Saxl kaj s-ro L. Friis preparantaj la internaciajn ferijajn Esperanto-kursojn.

internaciaj ferijaj kursoj dum sep jaroj konstante kreskadis laŭ nombro de la partoprenantoj. En la pasinta somero partoprenis 210 personoj el 14 landoj.

De la 16a ĝis 24a de julio okazos la internacia kursserio, kiu ampleksas **elementan** (laŭ Cseh-metodo), **daŭrigan** (laŭ konversacia metodo), **perfektigan** kaj **seminarian** kursojn.

De la 15-a ĝis 25-a de aŭgusto okazos la 10-taga internacia ferio esperantista kun 1-2 prelegoj ĉiutage de plej eminentaj Esperanto-prelegistoj. Dum la sama tempo estos ripetata la seminario kurso.

Jenaj personoj prelegos en ambaŭ aranĝoj aŭ en nur unu el ili: f-ino M. Saxl, Berlin; f-ino M. Noll, Kopenhago; s-ro de Waard, Rotterdam; rektoro s-ro Sam Jansson, Stockholm; s-ro Teo Jung, redaktoro de Heroldo, Hago-Scheveningen; s-ro P. Neergaard, LK-ano, Kopenhago; kaj s-ro L. Friis, Aabyhøj.

Posttagmeze estos aranĝataj diversaj ekskursoj al vidindaj lokoj (ekz. al sveda insulo Hveen kaj al sveda urbo Helsingborg). Vespere estos aranĝataj amuzaj, teatraĵoj, diskutoj, ktp.

La kostoj por partopreni la unuan kursseminaron (loĝo, manĝo kaj kotizo) estos 48,- d.kr. La kostoj por partopreni la 10-tagan ferion esperantistan estos 55,- d.kr. — 1,- d.kr. egalvaloras proks. 0,55 Rmk., 0,88 sv.kr., 0,90 norv.kr., 11 angl. penceojn, 0,40 nederl.guld., 6,65 fr.fk., 0,95 sv.fk., 6,50 belg.fk., 6,25 ĉeĥ.kr., 1,18 pol. zlot. Pro la malalta dana monkurso la partopreno en unu el la ferijaj aranĝoj estos eksterordinare malmultekosta. La manĝoj estas bonegaj kaj la ĉambroj belaj.

Somerrestadejo en Budapest.

Ekde la nuna somero ankaŭ Budapest, la « Reĝino de la Danubo », malfermos siajn pordegojn por la tutmonda esperantistaro, ebligante dum du semajnaj kursoj kaj internaciaj konversacioj malkaran somerrestadon inter plej agrablaj cirkonstancoj.

Estas la organizaĵo « Országos Baross Gábor Kör », kiu decidis aranĝi en Budapest esperantistajn « Internaciajn Feriajn Tagojn ». Dum tiuj tagoj la partoprenantoj, loĝante en unuaranga pensio, pasigos la tagojn inter la plej agrablaj variado de lernado, konversacio, promenado, sinbanado, remado kaj ekskursoj, de matene ĝis vespere. Dum la vesperaj horoj sekvas la ĝuado de ciganmuziko kaj dancado en la plej agrablaj internaciaj societo.

La prezoj estas eksterordinare malaltaj. Vojaĝrabatoj, kaj diversaj faciligoj. Interesuloj petu prospekton de: **O.B.G.K., Esperanto-Fako, Petöfi Sándor u. 9.IV.3, Budapest, Hungarujo.**

Kompreneble vi vizitos Southend-on-Sea

Kiel fidela verdstelano, vi ja venos al Anglujo je la okazo de la XXX-a Universala Kongreso en Londono. Konsentite, ke tio dependos de kelkaj cirkonstancoj, financaj kaj aliaj! Sed vi certe havas la firman intencon veni, kaj vi streĉos ĉiujn fortojn por efektiviĝi vian volon. Plej kredeble, do ni vidos vin en Londono.

Estante en la brita ĉefurbo, vi troviĝos ĉe rivero Tamizo. Tiu fama akvovojo fluas orienten, kaj sin verŝas en la Nordan Maron tra larĝa elfluejo. Tie, ĉe ĝia norda bordo, en provinco Essex, lokiĝas la bela moderna banurbo, Southend-on-Sea.

Kvankam la urbo evoluis relative moderne, tamen ĝiaj radikoj sin ŝovas profunde en la pasintecon. En Essex okazis sinsekvaj okupadoj de keltoj, romanoj, saksoj kaj danoj. En la jaro 894 p.K., la soldatoj de Reĝo Alfredo venkis la danojn en la Batalo de Benfleet, pelante ilin trans la sidejon de moderna Southend. En tiu ĉi landparto ankaŭ okazis multaj bataloj kontraŭ la danaj mar-rabistoj kaj piratoj. La Juĝtaga Libro, kompilita de Vilhelmo I en 1086, enhavas menciojn pri diversaj bienoj kaj komunumoj, kiuj nun estas partoj de Southend.

La ekesto de la urbo kiel sanigejo kaj libere tempo datumas de ĉirkaŭ 1794, kiam ĝi fariĝis laŭmoda marbanloko. En tiu tempo, kiam transportado de pasaĝeroj estis per ŝipo aŭ kaleŝego, Southend estis vizitata ĉefe de pli riĉaj homoj. Alveno de la fervojo en 1854 donis al la urbo fortan antaŭenpuŝon, kaj grade rezultigis ĝian nunan eminentecon kiel unu el la ĉefaj sanigejoj kaj vizitejoj de Anglujo.

La marbordo apud la urbo dum malalta tajdo estas malkovrita, kaj ĝi dissendas plej bonefikan formon de oksigeno. Pri tiu ĉi avantaĝo, kaj ankaŭ pro la fortikiga kvalito de la nordmara aero, kuracistoj sendas pacientojn al Southend de ĉiuj partoj de la Britaj Insuloj.

Hodiaŭ, Southend estas vizitejo posedanta belajn arboriĉajn krutaĵojn, kiuj dolĉe deklivas de la plialta promenejo ĝis la marbordo, kaj kiuj estas agrabligitaj per piedvojoj, publikaj ĝardenoj, herbejoj kaj florbedoj. La marborda promenejo estas sep mejlojn longa.

En suna vetero, la maro moviĝas super la varmigita marbordo per sablejon, tiel ke la akvo estas pli varma por banado, ol en la plimulto el marbordaj vizitejoj. La bordo estas el stablo kaj ŝtonetaĵo. Banado estas sendanĝera por plenaĝuloj kaj infanoj. Pro la ebenco de la marbordo, kaj la manko de fluoj en la akvo, la plialtiĝo de la envenanta tajdo estas malrapida.

En Southend troviĝas ĉiaj amuzoj kaj sportrimedoj, subĉielaj kaj sub ŝirmo de tegmento. Dum la someraj monatoj, plezurŝipoj veturas ĉiutage al diversaj aliaj anglaj marbordurboj; ankaŭ, je difinitaj tagoj, al Londono, Dundee, Boulogne, Calais, kaj Ostendo. La plej famaj militistaj kaj civilaj muzikistaroj ludas ĉiutage en la Krutaĵa Muzikistejo. La Marponto, 2,540-metra, estas la plej longa en la Brita Imperio. Promenante ĉe ĝia fino, oni sentas sin kvazaŭ sur transoceana ŝipego.

Ĉi tiuj allogaĵoj estas facile atingeblaj de Londono, ĉar la vagonara veturado okupas nur unu horon. En pasintaj jaroj, multaj diverslandaj esperantistoj vizitis Southend-on. Esperable, dum la kongresa periodo ili profitos la okazon por rekonatiĝi kun ĝiaj ĉarmoj. Ankaŭ venu tre multaj novaj vizitantoj, portante surbruste verdstelajn insignojn!

Se vi volas havi pli detalajn informojn pri la urbo, petu alsendon de gvidlibro aŭ broŝuro (enhavanta esperantlingvan parton) de: The Publicity Officer, Urba Inform-Oficejo, Pier Hill, Southend-on-Sea, Anglujo.

D. P. B.

Anglujo vokas gejunulojn

Vizitu la Junularan Tendaron!

Dum la semajno post la Universala Kongreso okazos tendaro por esperantistaj gejunuloj (aĝlimo 30 jaroj) ĉe bela tendarkampo apud Ipswich, en Orientanglujo.

Jen bona ŝanco intimiĝi kun kampara kaj provinca vivo en Anglujo meze de esperantistoj.

La tendarejo situas en bela kamparo proksime de Ipswich (90,000 loĝantoj) kaj estas disponigita al ni de la Ipswich Rotaria Klubo. Estas bona pavilono kaj naĝbaseno tie, kaj akvokondukita sistemo estas instalita. La tendojn pruntedonos la Ipswich-Skoltaro.

La tendaro estas organizita de la BEA en la kadro de la Postkongresaj Aranĝoj. Kunlaboros la loka Esperanta Grupo kaj Skolta Esperantista Ligo. Ĝi estas partoprenebla de iu ajn esperantista junulo, ĉu kongresano aŭ ne. **La kosto por unu semajno estas £ 1.0.0. Ĉi tio enkalkulas la manĝaĵojn.**

Apartaj, malkaraj ekskursoj estos aranĝataj por laŭdezira partopreno.

Eksterlandanoj — Ipswich estas facile atingebla, estante proksime de Harwich, kaj oni esperas, ke vi multnombre anoncos vin por sukcesigi la tendaron.

Oni anoncu sin al: S-ro C. C. Goldsmith, 30-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Venu multnombre!

Internacia Junularkunveno en Groet (Nederlando)

Ĝis nun anoncis sin por la kunveno jam pli ol 100 infanoj el: Francujo, Anglujo, Kimrujo, Polujo, Belgujo.

La kunveno daŭros unu semajnon (10-17 aŭgusto). La kosto estas: Por nederlandanoj: 7,50 guld.; por eksterlandanoj: 3,50 guld. (enkalkulite la ekskursoj). Nur infanoj, kiuj sufiĉe bone parolas Esperanton, rajtas partopreni. Oni anoncu sin al: « La Juna Vivo », West-Grafdijk, Nederlando.

Radio-Aŭskultantoj, atentu!

Radio-Roma eldonos kaj disdonos senpage la monatan programon en Esperanto, se...

Nuntempe E.I.A.R. (Ente Italiano Audizioni Radiofoniche) eldonas kaj disdonas senpage la monatan programon de la radio-stacio 2RO (25 m. 4 kaj 31 m. 13) en la lingvoj: itala, angla, franca, germana, hispana kaj portugala.

Por ĉiu el la supraj lingvoj ĝi aperigas ĉiumonate belaspektan broŝuron 24-paĝan kun verda kovrilo en formato 18x12.


Se sufiĉa nombro da radio-aŭskultantoj deziras regule ricevi la Esperantan eldonon, la Direkcio de E.I.A.R. eventuale aperigos la programon ankaŭ en tiu lingvo.

Oni atentigas, ke la radio-stacio 2RO dissendas ĉiusemajne du Esperantajn paroladojn: lunde kaj sabate.

Oni varme petas la esperantistajn organizaĵojn kaj unuopulojn propagandi por ke multaj samideanoj petu la eldonon en nia lingvo per la jena (aŭ simila) teksto: La subskribinto deziras ricevi ĉiumonate la Esperantan eldonon de la programo de 2RO. (Skribu tre klare la adreson!)

Ĉiun korespondadon oni adresu al: E.I.A.R., via Montello, 5 ROMA (Italujo).

Marko Nešić (Ĉika-Marko) †



Tiel li ridetis, ĉiam afabla kaj amikema, — la kantanta kaj muzikanta Esperanto-pioniro el Novi Sad en Jugoslavio, konata ankaŭ al multaj alilandaj gesamidenoj. Li ne ĝisvivis la feston, kiun la jugoslava esperantistaro preparis por festi lian 30-jaran esperantistecon, dum la 11-a Jugoslavia Esperanto-Kongreso, okazonta je nunjara pentekosto en lia hejmurbo Novi Sad. Sed li plu vivos en la koroj de siaj samlandanoj kaj de ĉiuj kiuj lin konis.

Ni funebras

— S-ro Prof. ALBERT LÄUFER en Mainz (Germanujo), katolika pastro, fervora samideano kaj fidela abonanto de «Heroldo de Esperanto», mortis la 30.3.1938. Ĝis la lastaj tagoj de sia vivo li vigle interesiĝis pri la Esperanto-movado. Ankoraŭ la 27.3. li skribis karton al nia redaktoro: « Via gazeto ĉiam estas al mi saluto el pli bona mondo » (aludo al la nedezirinda de Esperanto en Germanujo); en la sama karto li petis havigi al li la novan jarlibron de IEL. Tri tagojn poste la morto lin forrabis. Li ripozu pace!

— S-ino M. O'BRIEN HARRIS mortis la 22.4.1938 en sia 72-jaro. Fervora subtenantino de IEL kaj de la Esperanto-movado en Britujo, s-ino Harris estis bone konata ankaŭ ekster esperantistaj rondoj kiel Labor-partia membro de la administra aŭtoritato de Londono. Ŝi ripozu pace!

— S-ro MARKO NEŠIĆ, malnova jugoslava pioniro de Esperanto, komponisto kaj gitar-kantisto, konata sub la nomo « Ĉika-Marko » (onklo Marko), mortis en Novi Sad, Jugoslavio. Li ripozu pace!

— S-ino M. CVETLEROVÁ; membro de Esperantista Klubo « D-ro Schulhof » en Pardubice, Ĉeĥoslovakio, forpasis. Ŝi estis fratino de s-ino Ruzena Veverková en Pardubice, same kiel ŝi fidela kaj laborema animo de EACSĜ, kiu antaŭ nelonge jam perdis sian edzon, amikon kaj favoranton de nia movado. Profundan kondolencon!

La Esperanto-Literaturo kreskas

Argenta Duopo. Jubilea libro pri Baghy kaj Kalocsay, 2-a volumo. Redaktis V. Bleier kaj F. Szilágyi. 168 p., 23,5x13,5 cm. Prezo 1.10 dolaroj plus sendkostoj. Eldonis Literatura Mondo, Budapest. Havebla por gld. 2.30 (inkl. sendkostoj) de la Libroservo de Heroldo. Scheveningen, Nederlando.

La akompana prospekto de la eldonejo diras pri la enhavo: « Teatraĵoj, poemoj, scenoj, muziknotoj — ĉio, kio sufiĉas por aranĝi programajn vesperojn en grupoj ». Efektive, la materialo sufiĉas por pluraj vesperoj; sed por prezentado parte ĝi estas sufiĉe malfacila, ĉar ne ĉiu grupo posedas aktorojn kaj deklamantojn laŭ talento de Baghy.

Pri la « materialo » preskaŭ ne necesas ion diri, — la nomoj Baghy kaj Kalocsay pledas por si. Parte ni jam legis ĝin en pli fruaj eldonaĵoj, aŭ aŭdis ĝin deklamita el la buŝo de l' verkinto mem, — parte ĝi estas ĝis nun ne presita, kaj oni plezure nun konatiĝas kun ĝi. Min ankoraŭ pleje kaptas de Baghy la simpla, kortuŝa « Nur migri, ĉiam migri, migri for — postlasi ĉie iom el la kor' ». Malforta peco ŝajnas al mi « Ĉu Militon aŭ Pacon? », ĝia lingvaĵo estas tro bombasta. De Kalocsay oni trovas interalie la bone sukcesintan « Ezopa fablo » kaj premiitan « Kisoj »; mi miras, kial en tiun ĉi volumon oni ne akceptis ankaŭ fragmentojn el « Tragedio de l' homo » kaj « Infero ». Inter la muziknotoj mi retrovis la jam konatan kaj plezure re-renkontatan Baghy'an siberian lulkanton. Tiuj muziknotaj paĝoj cetere vekas mian specialan simpatian, ĉar ilin ne ĝenas tiu... terura verda kadro. Sed ja, oni komencis tiel en la unua volumo, kaj estis malfacile, lasi ĝin for en la dua. Mi esperas ke la vendataj ekzempleroj estas pli zorge broŝuritaj kaj malpli makulitaj ol mia recenz-ekzemplero. La enhavo certe valoras la prezon, ankaŭ la papero estas taŭga; sed la eksteraĵo, la libro-teknika aranĝo, ne estas inda je tiu jubilea eldonaĵo. M.

H. G. Wells: La Tempo-maŝino, kaj: La Lando de la Blinduloj. Tradukis el la angla E.W. Amos. — La « Epoko »-Libroklubo, Vol. IV. — 180 pĝ., konata formato, konata prezo. Havebla ĉe la Libroservo de « Heroldo de Esperanto », Scheveningen, Nederlando.

« Epoko »-Libroklubo prezentas al ni en sia kvara volumo du interesajn rakontojn de la fama angla verkisto.

La unua temas pri la problemo de la « kvara dimensio », kiu laŭ Wells estas la Tempo. La « tempo-vojaĝanto » estas homo, kiu inventis maŝinon, per kiu li kapablas laŭvole vojaĝi en la pasintecon aŭ en la estontecon. Ĉi-kaze lia vojaĝo kondukas lin en la estontecon, kaj nome en la jaron 802.701 post Kristo. Tre fantazia estas tiu ĉi rakonto, tro fantazia por esti verŝajna. Post ĝia lego restas naŭzeta sento kaj multaj demandoj.

La dua rakonto, pli verŝajna, priskribas la aventurojn de vidanta homo, hazarde trafinta en baritan valon, kie popolo de blinduloj vivas sian izolitan vivon. Ili eĉ ne scias, kio estas vido, opinias la vidanton nenormala, kaj kiam li ekamas unu el la blindaj knabinoj, ili volas konsenti geedziĝon nur, se li antaŭe lasos operacie forpreni de si la « ŝvelaĵojn » (okulojn) kiuj kaŭzas lian nenormaltecon. Priskribo kelkloke tre bela, kortuŝa, aliloke eĉ amuza; sed ankaŭ ĝi postlasas senton de nekontenteco.

Du strangaj sed interesaj rakontoj, en bona, flua traduko. M.

Esperanto, 18-a Kongreso de SAT, Bruselo, 7-13 aŭgusto 1938. Glumarko en ruĝa kaj verda presita sur blanka papero. Havebla de la O.K.K.: L. Štrajncamps, 148 Avenue du Roi, Bruxelles-Forest, Belgujo.

B. F. Maria HA de Vernyj: Dion adori. Dua(?) eldono. 64 p., 15,5x23,5 cm. Prezo 0.40 dol. + 10 %. Eldonis Literatura Mondo, Budapest.

Anticipo: la aŭtorino estas poetino. Kvankam pro la sengusta reklama prezento sur ĉiuj paĝoj de la kovrilo, en Esperanto kaj diversaj naciaj lingvoj (kun multaj eraroj) oni povus pensi la malon. Ĝiaj vortoj estas muziko, ĝiaj pensoj profundaj, misteraj, mistikaj, — tro misteraj por la kompreno de la amaso. Oni devas eklegi ilin en trankvila nokto, kaj oni devas venki sufiĉe fortan afliktiĝon en la komenco pro l' stranga aranĝo kaj pro manko de ia interpunkcio, — eĉ tiam oni legos ne sen sufero. Estas iom malsaneca en tiuj versoj melodij sed turmentaj. Kaj la plej piaj lokoj impresas plej erotike. Stranga, stranga verketo... T.J.

Emile Christophe: Estu radiesteza serĉisto! Tradukis Pierre Delaire. Unua ilustrita eldono esperantlingva. 224 p. 11,5x18,5 cm. Prezo afr. 34 francaj frankoj de la eldoninto s-ro Pierre Delaire, direktoro de « Radiesteza Gazeto », 63, rue de Patay, Orléans (Loiret), Francujo.

Radio-estezo estas interesa fako, de iuj kontraŭbatalata kiel sensencaĵo, de aliaj fervore defendata kiel mirinda scienco. Radi-estezo estas la arto percepti, per vergeto kaj pendolo, la radiadojn eliĝantajn el la materioj, homoj kaj bestoj, por trovi akvon, minaĵojn, malsanajn partojn de organismo ktp.

Ĉi tiu libro donas enkondukon en la misterojn de tiu fako. Tamen, legante ĝin, oni devas sufiĉe streĉi sian cerbon, unue pro la nekutima temo, kaj due pro la iom nefacila stilo de la libro, en kiu ankaŭ ne mankas presaj kaj gramatikaj eraroj. R-ano.

Paul Neergaard: Terminaro hortikultura seslingva (Esperanta, angla, dana, sveda, germana, franca) kun difinoj en Esperanto. — 29 p., 13,5 x 17,5 cm. Prezo 0.35 guld. plus sendkostoj. Eldonis SAT, 67 Avenue Gambetta, Paris.

Fakterminario apartenas al niaj plej gravaj eldonaĵoj, kvankam provizore ilia debito estas la plej malfacila. Tial meritas tiaj eldonaĵoj nian specialan atenton, kaj la eldonejoj, kiuj riskas ilian aperigon, meritas specialan laŭdon.

La hortikultura terminaro de Neergaard estas en sia unua parto aranĝita laŭteme, ĝi klarigas la Esperantajn terminojn per esperantlingvaj difinoj, aldonante parenteze la ekvivalentajn terminojn anglajn. La dua parto enhavas kvinlingvan terminaron, sen Esperanto, fotografe reproduktitan el Skandinava Enciklopedio Hortikultura. Do, la terminaro estas iom « hibrida », tamen uzebla, kaj uzinda.

La verketo povos utili al ĉiu « hortikulturisto » kiel ankaŭ al amatoroj de ĝardenkulturo.

« Pécs, Quinquecclesiae Sopianae », en pli frua tempo pli konata sub la germana nomo Fünfkirchen (= kvin preĝejoj) en vicigis en la nombro de tiuj urbaj kiuj eldonis esperantlingvan prospekton. Oni elektis la broŝurformon, kaj donas, sur 16 paĝoj (12,5 x 20,5 cm) kun kartona kovrilo, post historia superrigardo sufiĉe detalan priskribon ilustritan pri promenado tra la urbo. Ni ŝatus legi ankaŭ ion pri la nombro de loĝantoj. — Krome aperis ankaŭ du faldprospektoj en originala formo de leterpapero, kun artaj desegnaĵoj de nia samideano E. Gebauer kaj esperantlingva teksto: unu pri la urbo mem, la alia pli speciale pri solenaj ludoj religiaj (« Missa Sollemnis »). — La belajn propagandilojn oni povas ricevi senpage de: Idegenforgalmi Hivatal, Városhaza II. em. 74, Pécs, Hungarujo. Petu ilin per simpla poŝtkarto, esperantlingve!

Mondkuracloko Karlsbad, Ĉeĥoslovakujo. La plej fama kuracloko en la Ĉ.S.R. kaj unu el la plej konataj kuraclokoj en la mondo sendube estas Karlsbad. Ties kurac-administracio ĵus eldonis, laŭ iniciato de la vicurbestro s-ro Fr. Ulbert kaj de supera aktisto Kowarschick, novan efikan (fald)-prospekton, diverskolora presitan, en Esperanto. La prospekto enhavas planon pri la urbo Karlsbad kaj vicon de belaj ilustraĵoj kun klariga teksto.

La kurac-administracio de tiu fama internacia banloko kredas je la valoro de Esperanto por la interrilatoj en la moderna internacia vivo; ĝi konvinkigis dum la pasintaj jaroj en la plej diversaj fakoj kaj kongresoj pri la sukcesoj de l' internacia lingvo, kaj ĝuste tiuj sukcesoj estis por Karlsbad, kiel internacia banloko, kiu plej bone konas la necesojn de la banloka aferaro, instigo aranĝi sian propagandon per Esperanto. Samideanoj, amase petu la novan prospekton de: Kurverwaltung, Karlsbad, Ĉeĥoslovakio; montru ke la propagandado per Esperanto havas valoron! Mem vizitu tiun faman banlokon, se vi povos, aŭ instigu viajn konatojn ĝin viziti!

Krom la recenzita nova prospekto estas senpage je dispono de la interesigantoj ankaŭ aliaj esperantigitaj informoj pri Karlsbad (informoj por la kuracgasto, prezlisto de kuraciloj, nomaro de hoteloj ktp.), kaj cetere la kurac-administracio volonte plenumos senpage ĉiujn pliajn informojn.

Olomouc. Denove en Ĉeĥoslovaka Respubliko aperis belega kaj tre efika turisma broŝuro, konsistanta el 16 preskaŭ kvadrataj paĝoj (20x21 cm) kun bildoj en fotopreso, kaj 16 duonkvadrataj paĝoj kun teksto en Esperanto. Tiu ĉi teksto donas resumon pri la historio kaj signifo de Olomouc (= kastelo de Olomuĉ), la ĉefa urbo de Moravio, promenon tra la urbo, liston de hotelejoj kun prezoj, kaj dulingvan menukarton. Ni ekscias ankaŭ ke en Olomouc ekzistas Esperanto-memorŝtono kun memorarbo kaj Strato de D-ro Zamenhof. — Interesuloj petu senpagan ekzempleron de la broŝuro kaj ĉiujn informojn de: Urba Domo, Olomouc, Ĉeĥoslovakio.

Esperantista libertempejo Lázně Bělohrad, Ĉeĥoslovakujo. — 4-paĝa prospekto kun 3 ilustraĵoj; teksto en Esperanto. — **Internaciaj Esperanto-Kursoj.** 6-paĝa prospekto pri la kursoj en L. Bělohrad (10.-24.7.-1938), kun multaj laŭdesprimoj de vizitintaj gesamideanoj, kaj kun interesa vidaĵo de la Rokaro de Prachov. — Petu la prospektojn senpage de Esperantista Klubo, Lázně Bělohrad, Ĉeĥoslovakio.

La Unua Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno, Budapest 1938. Glumarko 3,3x4,2 cm, verde kaj flave presita sur blanka papero, montranta blankan krucon kun la eŭkaristia antaŭ la verda stelo. Prezo por 12 ekz. 1 resp-kupono, ĉe Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo, Petöfi Sándor-utca 9.IV.emelet 3.sz., Budapest.

Ljubljana, Jugoslavio, 6-11.VIII.1938. Kongreso XX. I.K.U.E. — Glumarko verde presita, 33 x 21 mm, montranta blankajn stelon kaj krucon antaŭ bildmotivoj el la kongresurbo. Haveblaj de « Nijaj Vizaĝoj », Ljubljana.

Lithuanie. Aperis grandformata 6-paĝa faldprospekto bone presita sur luksa papero pri la tendaro de korpa edukado por popollernejaj instruistoj (ne -inoj) en Palanga ĉe la bordo de l' Baltika Maro. 8 bildoj, situplano kaj teksto en lingvoj litova, franca kaj Esperanto. Instruistoj interesigantaj petu la prospekton de: Kūno Kultūros Rūmai, Kaunas, Litovio.

Tra la mondo

Promenado.

Jarmiliardojn lumas Suno kaj steloj tra l' Universo. Jarmilionojn sin turnas la Tero ĉirkaŭ la Suno, kaj ĉirkaŭ sia akso. Jarcentmilojn penas vivanta kreaĵaro, penas ankaŭ Homo, sur ĉi tiu Tero sin aranĝi. Penas, luktas, fiaskas, sukcesas, estras, servas, ĝojas, suferas, vivas kaj mortas. Sur ĉi tiu pilĝego neglata, kiu mem estas nur steleto, unu el milionoj da polvoj en senlima spaco, eklumantaj nur pro l' rebrilo de l' Astro pli granda.

Tion ni devas bildigi antaŭ niaj okuloj, volante prijuĝi ion ajn, kio estas okazanta sur nia terĝlobo, — sur ĉi tiu kosmo-erion kiu ni emas imagi la Mondo

Ili kiuj en la sinsekvo de la epokoj sin opiniis la estroj, la duondioj, la gvidantoj de l' homsortoj, ili kiuj en la forpaso de l' jarmiloj per la ĉo de sia bruado kaj sabroklakado vekis la montojn kaj valojn, ili kiuj volonte kondukis, kvazaŭ ne ekzistus volo krom la ilia, ili kiuj arogis juĝi pri vivo aŭ morto, — ili mem fatale estis dependantoj de l' sorto, de mil neantaŭviditaj — kvankam ne ĉiam neantaŭvideblaj — hazardaĵoj de l' okazado.

Ili kiuj ne estis, en la daŭro de la jarmiloj, estroj sed servantoj aŭ sklavoj, ili spertis ke sklavoj ne ĉiam sklavoj restis; ke post sklaveco kaj subpremo certe iam sekvas liberigo. Tiel estis pasinte, tiel estos estonte. Falos la subpremantoj, vivos la subpremitoj. Se ili tiam, la subpremitoj, post sia liberigo noblanime agos kun siaj subpremitoj, tiam povos ja sekvi kunvivado tolerebla, epoko de egaleco, de frateco, tempaĝo de relativa feliĉeco. Ve, se la homaro ne iam adoptos noblanimecon!

Dume la bonuloj povas nur strebi kaj klopodi, kaj la sklavoj, la subpremitoj, la suferantoj — esperi al pli bona estonteco.

La mondo brulas.

Promenante tra ĉi tiu mondo, kun teruro ni rimarkas unue, ke ĝi en diversaj lokoj brulas. Urboj ruiniĝas, eĉ ŝtatoj; flamoj lekas ĉielen, viktimoj krias mortangore. « Helpu, homfrato, dum homfrato nin atakas! » Homfratoj ŝultrolevas. Kiom ĝenas ilin vundoj, larmoj, pereoj, se ili sidas sendanĝere sub sia tegmento! Sed atentu! La brulo facile povos atingi ankaŭ vian domon!

Tragedio finiĝas iom post iom en Hispanujo. Post 23-monata milito oni tiras sangan bilancon. Preskaŭ duonmiliono da homoj en plej espere aĝo, krome

multaj maljunuloj, virinoj, infanoj pereis: sur batalkampoj, pro bombardoj, pro ekzekutoj. Kvarcent mil forlasis sian hejmon; kvarcent mil forvelkas en karceroj. Materialan domaĝon oni taksas je kvindek miliardoj da or-pesetoj!

En Ĉinujo la militmaŝinego estas en plena funkcio. Japanoj penetris en Suĉaŭ. Sed fino ne estas antaŭvidebla. Ankaŭ tie la Monstro formanĝis jam centmilojn da valoraj homvivoj.

Maltrankvileco regas pri *negrand* lando en Centra Eŭropo. Espereble per reciprokaj bonvolo kaj cedo paca solvo estos trovata.

En pluraj aliaj landoj ni vidis maltrankvilojn. Ribeloj en Brazilo kaj Meksiko estis subpremitaj.

Tamen estas iom pli esperiga situacio ol antaŭ kelkaj monatoj. Grandaj potencoj deziras eviti ĝeneralan militon. Okazis akordiĝo brita-itala. Oni atendas similan italan-francan. Poste sekvu pluaj.

La mondo iras sian marŝon.

Mortis famuloj.

Rusa kantisto Fodor Ivanoviĉ Saljapin, filo de ŝufaristo el vilaĝo proksime Kazan, iama vagabondo kaj ŝarĝoportisto, mortis 65-jara en Parizo. Oni rakontas ke li postlasis nemultan havaĵon, malgraŭ siaj bonegaj enspezoj. Li estis ĉiam tre malavara, precipe al siaj sampopolanoj, vivantaj en ekzilo, kiujn li multe subtenis.

En la germana ĉealpa urbeto Oberammergau forpasis la fama « Kristo » de la tieaj Pasionludoj, vernome Anton Lang. La unuan fojon li prezentis Kriston en 1900, la lastan fojon la 22-an de septembro de la pasinta jaro.

Pri ŝipoj. - La plej luksa jakto neuzita. - Mistera malapero en la Atlantiko. - Moderna arkeo de Noa.

En la haveno de Hamburgo naŭ jarojn kuŝis la jakto « *Savarona* » neuzita. Ĝi estis konstruita de germana ŝipfarejo por usona milionulo s-ro Cadwalader, kaj ĝi estis dirita « la plej luksa ŝipo en la mondo ». Ĝi kostis la bagatelon de 18 milionoj da markoj, kaj kiam ĝi estas plene okupita (30 ŝipanoj kaj ĉ. 40 gastoj), ĝi postulas ĉiutagan elspezon de preskaŭ 50.000 dolaroj. La ŝipo nur unufoje plenfunkciis, kiam ĝi estis uzata por filmo. Siatempe la milionulo ne volis, aŭ ne povis, pagi la tre altan importimposton, kiun la usona ŝtato postulis pro tio ke la jakto estis konstruita ekster-

lande. Oni diras ke la turka registaro volas nun aĉeti ĝin.

Meze de marto malaperis en la Atlantiko senpostsigne la « *Anglo-Australian* », 5456-tonela ŝipo, kun 38 homoj. Ĝi estis bone ekipita kaj havis du radiosendilojn. Ĝi venis de angla haveno kaj estis destinita por Kanado. La 14-an de marto la ŝipo, pasinte la Azorojn, signalis ke « ĉio bonordas ». De tiam eĉ ne SOS-voko estas aŭdita, nek iu restaĵo trovita de la ŝipo. Kio okazis al ĝi? Mistero de l' maro!

En la haveno de Rotterdamo alvenis ŝipo el Nederlanda Hindujo, kiu povas esti nomata moderna arkeo de Noa. Ĝi estas la « *Palembang* », kiu dum preskaŭ tuta monato loĝigis en sia ventro pli ol kvinmil bestojn. Inter ili estis tigroj, simioj, serpentoj, tre multaj birdoj, kaj eĉ unu Komodo-varano, speco de lacertego prahistoria, 2,60 metrojn longa kaj valoranta prezion de 2500 guldenoj. La bestoj estis destinitaj por la zoologiaj ĝardenoj de Rotterdamo, Edinburgo kaj de aliaj urboj.

Brita Imperia Ekspozicio.

En Glasgovo estas inaŭgurita la Imperia Ekspozicio de Granda Britujo. Heroldo jam parolis pri ĝi, kaj pri la 90-metra turo kiu superstaras ĝin. Tiu turo postulis tre detalajn antaŭkalkulojn de la arkitektoj. Ĝi ripozas nur sur kvar pilastroj kaj estas tre malpeze konstruita. Por ke la vento ne renverŝu ĝin, oni devis ĝin bone fundamentigi en bloko el armita betono de 15 × 15 × 6 metroj; 3000 toneloj da cemento estis bezonataj por muldi tiun blokon. La turo estas 8 metrojn larĝa; ĝi enhavas du liftojn kaj ŝtuparon. Sur ĝiaj balkonoj 600 homoj trovas lokon.

Nia afero.

Esperanto marŝas, malgraŭ ĉio. Ĝi suferis novan gravan baton: en Aŭstrio. Kompense la francaj aŭtoritatoj pli kaj pli favoriĝas por nia afero. En Britujo la Londona kongreso plivigligas la intereson por Esperanto; sed jam antaŭe en Britujo nia afero estis plej solida.

Nia ĉefa neŭtrala organizo, IEL, progresas nerapide, sed senskue ĝis nun. Eĉ Heroldo raportas ioman plimultiĝon de sia abonantaro. Por la Londona kongreso anoncis sin jam pli ol 1300 partoprenantoj — du monatojn antaŭ la malfermo tio estas atentinda rezultato.

Nia ideo pli kaj pli populariĝas. Malpermesoj de niaj organizoj en unuopaj landoj ne haltigos la evoluon. Nia ideo estas tute laŭtempa, tute aktuala. Ĝi trapenetros.

Zigzag.

Ĉeĥoslovakio kaj la 10-a Sokola Olimpiado en Praha 1938

La ĉeĥoslovakian nacion kaj ĝian ŝtaton konis la eksterlanda mondo plejparte nur laŭ la produktoj de riĉa industrio, kiu la markon « Made in Czechoslovakia » sciis fari rekonata garantio de la kvalito kaj solideco; laŭ la mondfamaj banlokoj, kiuj jam dum jarcentoj servas al la suferanta homaro. Nur lastatempe Ĉeĥoslovaka Respubliko fariĝas fokuso de intereso pro sia centroeŭropa situo.

La jaro 1938 liveros al tuta mondo unikan okazon ekkoni proprasparte ankaŭ la tutan kulturvaloron de la ĉeĥoslovaka nacio en ĝia plej alta kulmino, kiel ĝi manifestiĝos okaze de la 10-a Universala Sokola Olimpiado (« Slet ») en Praha, kiu estas kongreso de la plej granda kaj plej malnova nacia gimnastik-organizo. La Sokol-movado estas monda kulturfaktoro kun tradicio daŭranta pli ol tri kvaronojn da jarcento kaj

greka « kallokatathia » — ke la problemo pri la renaskiĝo de la ĉeĥoslovaka nacio estas la problemo pri fizike kaj morale valora ĉeĥoslovaka homo; tiun edifi kaj krei, tiun konservi, por ke la korpa kaj psika beloj estiĝu memkompreneblaj atributoj de ĉiu ĉeĥoslovakano, tion li opiniis sia dekomenca tasko. La heredaĵon de sia fondinto gardas la ĉeĥoslovaka Sokolaro, kaj ĝi kreas helpe de sia anaro la novan ĉeĥoslovakian homon. Hodiaŭ havas la Sokolasocioj jam ĉirkaŭ 800.000 membrojn


Laŭ la greka modelo okazas en Praha jam de la jaro 1882 Sokolaj Olimpiadoj. Ili apartenas al la plej grandiozaj gimnastikaj festoj de la mondo.

La unua Olimpiado okazis 1882, kaj tiam gimnastis 700 viroj libermovajn (seninstrumentajn) ekzercojn. Ĉe la 6-a Kongreso 1912 gimnastis la libermovajn

pia de la aktiva Greklando, tio estos unuiĝo de homoj por plenanima manifestado, montranta superan belon de la unueco kaj kooperado: la belon de la ludoj kun la belo de la ideo; la korpan forton kun ĉio, kio estas super ĝi kaj kio ĝin levas al la spirita valoroj de la hom-ekzisto... Ne estos anonimuloj de antikva praepoko, mortaj herooj de la historio; estos homoj, kiuj efektive vivas inter ni la belan ĉiutagan vivon, por refoje ĉiam post ses jaroj donaci al si kaj al la homoj de bona volo la ekzaltajn, feliĉajn tagojn de la sokola « Slet ».

Samtempe kun la Kongreso okazos ankaŭ la Internacia Gimnasta Konkurso, kies aranĝo estis al la ĉeĥoslovaka Sokolaro komisiita. Tiu ĉi konkurso venigos al Praha la eliton de tutmondaj gimnastoj.

Por la kultura mondo estos tiu ĉi So-



sanktigita per alta morala strebo dum la tempoj de la plej grandaj interŝtataj malfacilaĵoj.

Post glora pasinteco de la 9-a ĝis 14-a jarcentoj, kiam la ĉeĥoslovaka nacio eminentis sur la kultura kaj politika agadkampoj de Eŭropo, la malfavoro de la Fortuno faligis ĝin sub fremdan jugon, en kiu ĝi ne rajtis libere evolui en la monda nacifamilio. Kiel la aliaj ankaŭ ĝi aspiris ekde la 19-a jarcento renovigon de libera nacia kulturo, kaj unu el la naciaj manifestoj de tiuj ĉi klopodoj estis fondo de la Sokol-movado.

La unuan Sokol-asociacion fondis en Praha 1862 la ideoj kreintoj de la sokolismo: D-ro M. Tyrš kaj J. Fügner. D-ro Tyrš, profesoro de estetiko, kiu per studoj pri la kulturo de antikvaj epokoj vere travivis la profundan esencon de la homaro kaj ĝian moralan mision, komprenis — konstruante sur la idealo de la

ekzercojn jam 18.000 viroj, 5.600 virinoj, 1.065 junuloj, 2.097 lernantoj kaj 1.980 lernantinoj. Ĉe la 9-a Kongreso 1932 aperis sur la areno en Praha pli ol 30.000 viroj, 30.000 virinoj kaj 80.000 geknaboj. En diversaj sportfakoj konkuris 6.000 atletoj. Po 17.000 virinoj kaj po 14.000 junuloj kaj junulinoj inundis la stadionon por komuna gimnastikado, kiu estis unika fenomeno ne nur kiel sporta prezentado sed ankaŭ kiel estetika spektaklo. Tiuj 140.000 gimnastoj kunveturis el tuta Ĉeĥoslovakio je propraj kostoj, por kolektive montri la rezulton de la Sokola edukado.

La Olimpiado en la jaro 1938 estos multlilate eĉ pli impona entrepreno. Sur vastega areno (150.000 sidlokoj, 250.000 rigardantoj) oni ekvidos samtempe gimnasti po 30.000 virojn kaj virinojn dum ravaj momentoj de preskaŭ superreala grandiozece. Tio estos reviviĝinta Olym-

kola kongreso sociologia fenomeno de alta valoro. Ĝi montros, ke estas ebla ankaŭ libervola nacia disciplino, kiu povas esti fundamento de nacia forto kaj elano.

Tiu ĉi granda sporta soleno estos akompanata de diversaj kulturentreprenoj (ekspozicioj, koncertoj, teatroj, popolfestoj k.s.). Al Praha venos 500.000 ĉeĥoslovakoj enlandaj kaj eksterlandaj, multaj inter ili en koloriĉaj naciaj kostumoj, tiel ke la Olimpiado estos ankaŭ ege interesa folkloro revuo.

Sokola Olimpiado estos kulmina kultur-okazaĵo de la mondo en la jaro 1938. Vi ekkonos la ĉeĥoslovakian nacion, se vi venos ĉi-jare dum junio kaj julio rigardi la tradician gimnastikan feston, la 10-an Sokolan Olimpiadon en Praha 1938.

MAROKO

Maroko fariĝas ĉiutage pli « laŭmoda ». Ĉiam pli ofte vizitas ĝin unuopaj turistoj; komunaj ekskursoj, eĉ tutaj turistaj ŝipoj albordiĝas Marokon, el la tuta mondo.

Por atingi Marokon, sufiĉas nuntempe du plenaj tagnoktoj, kiam oni prenas kiel elirpunkton Marsilion (Marseille). Luksaj vaporŝipegoj forgesigas la marvojaĝajn « malagrablaĵojn », kiujn oni trapasas troviĝante la unuan fojon sur la senborda maro. Kaj jam sur la ŝipo estas rimarkebla la ekzotismo, kvankam oni

kiu tamen estas dependa de la franca ĝenerala rezidanto.

La palaco de la sultano, la rezidant-ejo kaj ĉiuj registaraj konstruaĵoj troviĝas en *Rabat*, mezgranda urbo de « aristokratoj ».

La plej granda urbo kaj plej granda koncentriĝo de eŭropanoj, urbo de eŭropa komerco, estas sendube *Casablanca*, granda haveno, ligilo inter Eŭropo kaj Afriko, rapide disvolviĝanta, havanta nuntempe ĉirkaŭ 260.000 loĝantojn. Casablanca estas konsiderata



Arabaj virinoj.

ĝin la unuan fojon renkontas en Marsilio. Ĉi tie sur la ferdeko de la ŝipo, oni povas diri, ke la ekzotiko ĉirkaŭas nin pli kaj pli malvaste, — la cirklo kiu fermiĝos en Maroko.

Maroko !

Lando de kontrastoj, amasiĝo de plej diversaj situacioj, kie oni rimarkas la bildojn de la bibliaj tempoj kaj apude la plej modernan eŭropan civilizacion. Aŭtomobilo apud kamelo, azeneto pene portanta surdorse sian « sinjoron kaj regnestron »; arabino dense ĉirkaŭvoluita en siaj blankaj vestoj, francino sidanta ĉe « aperitivo » en ĉestrata kafejo, moderna virino kun cigaredo inter la fingroj.

Kaj nenie, en neniu alia « turista » lando, oni renkontas tiom multe da vera kaj kompleta ekzotismo je nur kelkaj paŝoj de luksaj, plej modernaj hotel-egoj.

Maroko havas sian pramalnovan araban kulturon, kiu radikikiĝis funde en la animo de l' maroka popolo. Kaj la tri elementoj: la mezepoko, kiu ankoraŭ plene tie regas, la beleco de la naturo, kaj la profunda kulturo, faras el Maroko landon de ne-ĉiutaga beleco.

Ĝi posedas kvin milionojn da indiĝenaj loĝantoj kaj kelkcent mil eŭropanojn. Nun reganta sultano estas *Sidi Mahomed III-a*, plene suverena regnestro, kun siaj armeo, mono, impostoj,

kiel metropolo de l'eŭropa burĝaro, — Rabat kiel metropolo de l' aristokrataro kaj de la politiko.

Tamen k v a r ĉefurboj ekzistas en Maroko: Fez, Marakeŝ, Rabat kaj Meknes, kaj ĉiu el ili havas sian apartan okulfrapan aspekton.

Fez, jen ĉefa komerca kaj arab-kultura centro.

Marakeŝ, vere afrika urbo, kiu estas pli ĝuste oazo en larĝa dezerto; tie oni rimarkas preskaŭ nigravizaĝajn indiĝenojn. La tieaj marokanoj estas miksaĵo de berber-arab-negra deveno.

Rabat klopodas en kiel eble plej rapida tempo deĵeti ĉiun araban nuancon, rapide eŭropiĝanta, moderna, sinjoreca urbo.

Meknes. Ĝi meritas apartan paĝon. Ĝin oni povus nomi urbo de pordegoj. Pro ili Meknes atingis rekordon kaj famiĝis tra tuta Maroko. La belega pordo Bab el Mansur el Aleudz (Aleŭĝ) estas rekonita kiel la plej bela en Maroko. Ĝi estas triumfa arko-pordo el ŝtono en pura daŭra stilo. Tiun ĉi urbon konstruis fama sultano Moulay Izmail, kiu famiĝis ankaŭ pro siaj 500 (kvin cent) edzinoj.

Ne malpli interesa estas la historio de Maroko, kiu prezentiĝas kiel longa vico da bataloj inter la berberoj — la ĝusta maroka popolo, devenanta en rekta linio de prahistoriaj marokaj loĝantoj — kaj fremdaj subpremanoj.

Casablanca

Pri Casablanca, oni povas diri, ke ĝi estas unu el la plej belaj kaj plej modernaj havenoj de l' mondo. Laŭ onidiro, sur la loko, kie hodiaŭ ĝi troviĝas, antaŭ jarcentoj la fenikoj konstruis malgrandan urbeton Anfa, kiun nomon ĝis hodiaŭ portas marban-urbeto apud Casablanca. Estis portugaloj kiuj, ĝin detruinte, konstruis alian urbon kun la hodiaŭa nomo. Poste berberoj okupis ĝin, nomante ĝin Dar el Beida, kio same kiel Casablanca signifas « Blanka domo ».

Kiam oni albordiĝas en Casablanca, tuj okulfrapas la ekzotismo. La araboj en siaj pentrindaj diverskoloraj vestoj, kun blankaj kaj flavaj turbanoj, ruĝaj fezoj, diverskoloraj burnusoj, faras multan bruegon kaj kun vere orienta altrudemo proponas siajn servojn. Alproksimiĝante al la urbocentro per plej moderna aŭtomobilo, oni rimarkas surstrate apud kuregantaj luksaj aŭtoveturiloj la arabojn sur iliaj azenetoj, malrapidemajn, ĉiam tempon havantajn. Casablanca havas ĉirkaŭ 20.000 aŭtomobilojn.

La arabinoj hermetike ĉirkaŭvolvitaj per siaj blankaj robtukoj aŭ en viraj (lasta « krio » de l' arabina modo) burnusoj kun « kvef »-kovritaj vizaĝoj, aspektantaj kiel kluk-kluks-klan-sektoj, apud la elegante vestita eŭropa preterpasanto...

La kafejoj, kiuj troviĝas en preskaŭ ĉiu domo, estas plenplenigitaj de diversnacia klientaro. Inter ĝi oni ofte rimarkas araban eŭropiĝantan sinjoran moŝton, kiu konservis ankoraŭ sian pentrindan kostumon, sed kies piedvesto estas jam eŭropa, kaj ĝin li manifestas, alten tenante ĝin, metinte genuon sur genuon. Ofte oni renkontas ĉi tie kaj tie arabojn duoneŭrope kaj duonarabe vestitajn: eŭropa surtuto super arabaj pantalonoj ĝisgenuaj, similantaj virinan ĵupon; al tiu « interesa » vesto oni aldonu ŝtrumpetojn irantajn ĝis la kruromezo, kiujn oni firmitenas per ŝtrumptenilo; la silueton kompletigas araba piedvesto — simila iomete al holandaj naciaj sed el ledo kaj sen malantaŭa parto —, fine ruĝa fezo aŭ turbano.

La virinoj estas ankoraŭ konservativaj, kaj ĵaluzo gardataj hejme.

La urbo konsistas el eŭropa kaj indiĝena partoj. Francoj ĉiam konstruadis siajn urbojn apud jam ekzistantaj arabaj urboj, ne enirante ilin loĝcele kaj ne detruante ilin. Tial araboj senĝene daŭrigas sian mezepokan vivon. Casablanca estas vere blanka; ĉiuj domoj, nubskrapuloj kaj publikaj konstruaĵoj estas blanke pentritaj. En la luksega vilao-kvartalo ĉiu domo konsistas el unusola loĝejo ĉirkaŭita de belega flor- kaj palm-ĝardeno. Rimarkinde estas, ke ĉiupaŝe oni renkontas multajn florojn, verdajn, kaj palmojn... palmojn.

La urbo havas multe da belaj, palm-

ornamitaj bulvaroj, placoj, — sed ĉion superas per sia beleco la park-kvartalo, kiu estas kvazaŭ la pulmoj de la urbo.

Por film-amantoj oni konstruis pli ol dek kino-palacojn, plej moderne aranĝitajn interne kaj ekstere; la filmprogramoj daŭras 3 ½-4 horojn. Kabaretoj kaj « bar »-oj, « dancing »-oj kaj dancejoj, teatro kun nekonstanta aktoraro — ĝin vizitas ofte mondfamaj artistoj de Eŭropo; aro da sportejoj kaj moderna konstruaĵo de fizik-edukejoj; — ĉi ĉio agrablige la vivon de Kasablankanoj.

Pri Casablanca oni diras juste, ke ĝi estas la plej granda koloni-verko de francoj. Ĉe la impona laŭ grandeco administrata placo troviĝas tre belaj urbonstruaĵoj en la novmaŭra stilo; la poŝto, la urbdomo kaj la juĝejo prezentas vere majstroverkojn de arkitektura arto; fine kelkaj monumentoj kaj kun pieco gardata malnova primitiva barako, kiun starigis la unuaj francaj okupaciaj trupoj. Ĉi tiuj kelkaj signoj pri la tradicio estas veraj kontrastoj de la nuna pulsanta vivo plene turnanta sin al estonteco en la kadroj de l' urbo, realiganta la plej modernajn arkitekt-ideojn.

Malgraŭ ke la indiĝena kvartalo estas negranda kaj ĝenerale ne tro interesa, oni povas tie trovi kelkajn karakterizajn scenojn. La pitoreskaj stratetoj, kie pene oni sin traŝovas, kiam krom ni preterpaŝas indiĝeno sur sia tradicia azeno, estas ofte okupitaj flanke de diverspecaj « saĝuloj » sidantaj kun krucigitaj kruoj, eksplikantaj al siaj klientoj la saĝon de la Korano, aŭ skribantaj, laŭ mendo, leterojn, aŭ legantaj la prezentitajn leterojn, — ĉi ĉio estas farata per maniero diskreta, t.e. oni flustras la vortojn en la orelojn de la klientoj. Ofte mi renkontis la « gravulojn » ŝirmantaj sin, oni ne scias kontraŭ kio, per pluvombreloj; sed supozeble por pliseriozigi sian oficon. Ĉe alia flanko la indiĝena apotekisto vendas al iu belulino ameliksiron kaj seriozmiene eksplikas la uzmanieron. Aliloke iu stranga individuo « kantas » ĉirkaŭite de artamanta « publiko ». Ĉi tie kaj tie la araba barbiro razas sian viktimon, lasante sur la kapinto longetan harpecon, certe la bedaŭrindulo malhavas kapkovraĵon, kaj tamen deziras enĉieligi.

Kaj ĉi ĉion apartigas de la dudekjarcenta civilizacio nur defenda ŝtonmuro, ĉe kies ekstera flanko en plej moderne ekipita frizejo oni buklas virinkapojn per elektra aparato. Ankoraŭ kelkaj paŝoj, kaj oni troviĝas sur la ĉiam bruega « souk » (vendoplaco), kiu ĉiam funkciadas, kie ĉiam oni trovas aron da aĉetantoj, inter kiuj svarmas amaso da almozuloj, malfeliĉaj estaĵoj, kriplaj, plej ofte blindaj, gvidataj de aliaj, viduloj. Jen ĉio.

Casablanca, eĉ tiu indiĝena, malgraŭ la unua impresoj ne tro abundas de ek-

La influo de la gazetaro al krimo

La problemo de influo de la gazetaro al krimo estas problemo pli grava ol oni povus supozi. Analizante tiun problemon sur pli vasta bazo, oni ne povas preterlasi la regulon de malkaŝeco ĉe la punproceduro, kiu estas unu el la fundamentaj reguloj de la novtempa punproceso. La novtempa punproceduro ekestiĝis kiel reakcio kontraŭ tia proceduro de la mezepoko. La plej doloriga flanko de la mezepoka inkvizicio estis la kaŝeco de la punproceso, kio en la praktiko signifis, ke la akuzito estis lasita al la volo de la juĝisto, ne kontrolata de iu ajn. La reakcio kontraŭ tiu stato devis do esti radikala: ne analizante la problemon mem, oni akceptis regulon, ke la proceso estu malkaŝa, kio en la praktiko signifas bridon de juĝista memvola despotismo rilate al la akuzito.

Tiu regulo sendube estas prava kaj ĝi entenas multajn bonajn flankojn. La juĝisto, sciante, ke li estas kvazaŭ kontrolata de la publika opinio, kiu diligente sekvas la proceson, devas nepre leviĝi al nivelo de objektivismo. Tio do estas la plusa flanko de la punproceduro. Sed oni ne povas ankaŭ neglekti la minusajn punktojn de tiu problemo, kaj ĝuste tiu momento de la punproceso kuniĝas kun la demando pri influo de la gazetaro al krimo.

Ni rigardu la juĝejan salonon dum proceso: ĉu ni devas memori, ke proceso de « profesiulo » pro pli grava krimo aliras en la juĝejo-salonon ne nur liaj konatojn kaj amikojn, sed ankaŭ ĉiujn tiujn de la subtera mondo, kiuj venas en la juĝejon por lerni la malbonajn flankojn kaj erarojn de la profesiulo, kiuj kaŭzis lian enfalon. Tiuj aperaĵoj estas bone konataj same al la juĝejo kiel al la polico, sed malgraŭ tio estas preskaŭ neeble malebligi al la krimula mondo perfektigi en sia profesio dum la punprocesoj de ĝiaj kamaradoj en la juĝejo.

Simile okazas kun la detalaj raportoj pri proceso kaj tute precizaj priskriboj de krimoj, faritaj de kelkiuj gazetoj, sin nutrantaj per sensacio. Tiaj gazetoj plej ofte prezentas krimulojn kvazaŭ heroojn. Tiajn gazetojn ni nomas « pavimaj », sed ili, bedaŭrinde, tre ofte estas la sola legajo inter la malriĉulaj sferoj.

Preciza priskribo de krimo, kun detala prezento de la ago-plano: pretigado,

zotismo. Ĝin oni trovas precipe pli sude, en Marakeŝ, la koro de Maroko.

Por doni plenan bildon pri nia granda havenurbo, mi devus ankoraŭ mencii pri pentrindaj kostumoj de ĉitiea policistaro, kiu majstre direktas la viglegan movadon surstratan.

Irène Fink, Casablanca.

preparado de iloj, speco de iloj ktp., ĉu ĝi ne estas certgrade perfektiga kurso kaj instigo por imitantoj, kiuj entreprenas la agon aŭ por pano, aŭ kelkfoje pro false komprenita « gloro »? Ja tiom multajn ni havas ekzemplojn de krimoj faritaj sub influo de alia krimo, pri kiu la delinkvento legis en gazeto aŭ ie alie.

La fama Urke Naĥalnik en unu el siaj libroj konfesis, ke lia plej bona konsilanto estis la... gazetaro, kiu simple donis al li informojn, kiel li devas konduki, kie kaŝiĝi, kiel erarigi la policon ktp. (La nomita Urke Naĥalnik estis simpla kriminala krimulo, kondamnita pro multaj krimoj. Li pasigis 15 jarojn en diversaj polaj malliberejoj. En la malliberejo li malkovris en si verkistajn kapablojn kaj komencis verkadi librojn. Liaj romanoj kaj memorolibroj estas nun tre famaj en Polujo, kaj ilia aŭtoro, Urke Naĥalnik, estas estimata verkisto kaj membro de la verkista sindikato.)

La gazetaro, informante pri la krimo-esplorado en ĉiu ĝia stadio, informas tiamaniere la krimulojn pri ĉiu paŝo de la esplora polico. En kelkaj ŝtatoj ekzistas leĝoj, malpermesantaj al ĵurnaloj skribadi pri krimoj. Estas nur permesite doni mallongan kaj sekan informon pri la okazinta krimo.

Tia malpermeso estis akceptita sendube pro tio, ke oni konvinkiĝis, ke la priskribo de la rimedoj kaj lerteco de krimuloj malbone influas iujn legantojn kaj ĝi kaŭzas imitadon.

Jen mi havas en la mano unu el la Varsoviaj taggazetoj. Sur unu el ĝiaj paĝoj troviĝas « artikoloj » kun jenaj titoloj:

1. Kruela « anĝelo-fabrikistino » arestita sur la ponto de la Vistulo.

2. Eksterordinara kariero de « Hochstapler-Polo », murdinto de milionulo arestita en Brazilo

3. Posedanto de loterio-filio, ĉefo de bando de valuto-krimuloj.

4. Senfina ĉeno de ŝteloj, eksterordinara entreprenado de loĝanto de malriĉula domo.

La kruelan « anĝelo-fabrikistino » prezentis la gazeto, kiel sufiĉe bone prosperantan entreprenon, profesion, konsistantan en tio, « ke oni prenas por protekti kaj eduki infanojn, oni prenas por ĉiu infano bonan sumon, la infanon oni tuj mortigas, kaj la tuta profito iras en la poŝon ». Ne malpli promesa estas la enhavo de la ceteraj « artikoloj », kaj oni povas sendube diri, ke ilia influo al iuj legantoj povas fariĝi fatala.

En la faka ĵurnalo de la polaj policistoj « Na posterunku » aperis konkretaj ekzemploj de krimoj, faritaj sub influo de gazetoj, kie similaj krimoj estis priskribitaj. Tiuj ekzemploj estis prezentitaj de policistoj kiuj persone esploris la menciitajn krimojn.

H. Gielb.

R. F. Vaughan :

Bornea popololegendo

« Al ĉiu bonfaru, kiom ajn malalta ! »

Iam unu viro el la Dusuna gento, nomita Gilangtanah, fianĉigis kun la filino de unu ĉefo; belvizaĝa kaj plaĉa junulo li estis, sed senhava.

Do la patro de la junulino, pripensante nur la edziĝdonacon, promesis tiun filinon al filo de unu ĉefo, riĉulo. Gilangtanah, urue malkredema pri tiu perfido, kiam li certiĝis pri ĝi, akriĝis sian glaveton kaj ekiris por viziti la patron de sia amatino, kiu loĝis malproksime.

Transirante rivereton, li ekaŭdis alvokantan voĉeton: « Ho! Gilangtanah, helpu nin! Mi kaj mia popolo deziras transiri ĉi tiun rivereton. » Estis la Reĝo de la Formikoj, kiu alvokis. Kolera pro ĉiu tiu interrompo, tamen Gilangtanah per sia akra glaveto detranĉis branĉeton kaj, kuŝiginte ĝin por ke la formikoj povu transiri la rivereton, daŭrigadis sian marŝadon.

« Dankon, Gilangtanah, mi ne forgesos, eble mi povos iam repagi vian komplezon », danke alkriis al li la Reĝo de la Formikoj, sed Gilangtanah, forrapidante, apenaŭ atentis lian diron.

Marŝante, denove li ekaŭdis alvokantan voĉon: « Ho! Gilangtanah, liberigu min! » Estis cervo kiu, kaptiĝinte en kaptilo, alvokis lin. Senpacienca, facile per sia akra glaveto Gilangtanah liberigis ĝin. « Dankon, Gilangtanah, mi ne forgesos, eble mi povos iam repagi vian kompatemon », alkriis al li, danke, la liberigita cervo, forsaltante; sed Gilangtanah, forrapidante, apenaŭ atentis ĝian diron. Ankoraŭ rapidante, preskaŭ atinginte la domon de la amatino, denove Gilangtanah ekaŭdis alvokantan voĉeton. « Ho! Gilangtanah, liberigu min! » Jen fajromuŝo kiu, kaptiĝinte en aranea kaptilo, alvokis lin. Kolera pro la interrompo, tamen Gilangtanah haltis kaj liberigis la insekton.

« Dankon », alkriis al li, danke, la liberigita fajromuŝo, « mi ne forgesos, eble mi povos iam repagi vian kompatemon. » Sed Gilangtanah, forrapidante, apenaŭ atentis ĝian diron. Kiam li alvenis al la hejmo de la amatino, ekvidante lin, la patro tre timis, kaj li mensogis: « Ne, » li diris, « mi ne proponis, kiel oni sciigis al vi, edzinigi mian filinon kun alia viro, nur mi proponas provi vin kaj alian svatanton, filon de ĉefo, kiu estas multe pli riĉa ol vi. Tiu, kiu pli sukcesos pri miaj provoj, fariĝos mia bofilo. »

Kaj jen la provoj de la ruza patro :

« Unue oni disŝutos en arbaro etajn vitrajn globetojn; la svatantoj devos serĉi ilin kaj reporti kiel eble plej multajn », sed sekrete la trompema patro

donis al la de li favorata svatanto provizon de tiuj globetoj.

Malĝoje Gilangtanah serĉadis en la arbaro, neniun globeton li povis trovi en la falintaj folioj kaj la herbaro. Tiam preterpasis la Reĝo de la Formikoj. « Kio malĝojigas vin, ho, kara, Gilangtanah? » li demandis, kaj kiam Gilangtanah sciigis lin pri sia malfacila tasko, « Retrankviliĝu », diris la Reĝo, « mi alvokos miajn regatojn ». Kaj rapide la formikoj alvenis kaj rapide kolektis ĉiujn globetojn, kaj Gilangtanah ĝoje reportis ilin. La riĉa ĉefo same malsukcesis, sed, fidante al la globetoj donitaj de la patro, jam li revenis, certa, ke li venkos. Sed kiam oni vidis la globetojn reportitajn de Gilangtanah, oni ekmiris kaj proklamis lin la gajninto!

Tiel malkontentigite, la patro proponis plian provon; la svatantojn li sendis malproksimen al montego, de kie ili devos reporti kiel eble plej rapide foliojn de iu malofta planto nur tie trov- ebla. Al la junuloj li donis ĉevalojn, sed al la riĉulo li donis bonegan, al Gilangtanah li donis aĉan. Tamen kuraĝe tiu ĉi forrajdis, kvankam lia rivalo jam malaperis en la malproksimecon. Sed baldaŭ la ĉevalaĉo ellaciĝis, kaj kompare Gilangtanah haltigis ĝin, dirante al si: « Ho ve! Mi perdis mian adoratinon pro la malfavoro de ŝia trompema patro! » Sed en tiu momento alsaltis cervo, kiu diris al li: « Ho, kara Gilangtanah, kio tiel ĉagrenegas vin? » Kaj kiam la junulo klarigis pri tio, la cervo, danko, re-diris: « Mi ne forgesas vian kompatemon. Alligu vian ĉevalon al arbo kaj sursaltu mian dorson; kiam ni estos revenintaj, via ĉevalo estos rebonstatiginta kaj sur ĝi vi povos daŭrigi vian vojaĝon. » Ĝoje Gilangtanah sursaltis la cervon, kaj rapide ĝi portis lin al la malproksima montego kaj reportis lin. Kiam oni vidis ke li revenas la unua, rajdanta sur la ĉevalaĉo kaj ke li alportas la nomitajn foliojn, oni ja miregis. Sed, denove malkontentigite, la patro postulis eĉ plian provon. « Mi permesos al vi edziĝi kun tiu mia filino, kiun vi deziras, se vi povos tuj eltrovi ŝin, ligitan kaj buŝŝtopitan kaj enmetitan en malluman ĉambron kune kun ŝiaj kvar fratinoj same traktitaj. »

Nokte oni metis la kvin fratinojn en malluman ĉambron kun la membroj firme ligitaj kaj la buŝoj ŝtopitaj.

Kiam ĉe la pordo Gilangtanah staris hezitante kaj murmurante al si pri sia malfeliĉa sorto, alflugis fajromuŝo, kiu diris al li: « Kio tiel maltrankviligas vin, ho kara Gilangtanah? » Kaj kiam la junulo rakontis al ĝi sian tutan malfeliĉon, « Retrankviliĝu », diris la fajro-

muŝo, « mi ne estas maldanka. Mi konas vian amatinojn; kune ni eniros la ĉambron, kaj tuj mi montros ŝin, eksuriĝante ŝiajn harojn. »

Tiel helpite, Gilangtanah tuj per sia akra glaveto liberigis kaj ĝoje ŝin elkondukis. Nun la malfidinda patro ne povis rifuzi plu kaj donis ŝin al ŝia amanto trifoje sukcesa, dirante: « Vi ja ŝin meritas. »

—o—

Longedaŭra kaj gajega estis la edziĝofesto de la admirinda Gilangtanah.

—o—

La moralaĵo de ĉi tiu rakonto elstaras por ĉiuj.

Rido Sanigas

Esperanto estas ĉies proprajo, —
ankaŭ pluvombrelo estas ĉies proprajo.

— Nu, Margareto, ĉu vi bonvolos redoni al mi la pluvombrelon kiun mi pruntis al vi?

— Ho, sed vere, ekkrias Margareto, morgaŭ mi repetos ĝin de mia fratino kiu ĝin pruntedonis al amikino.

— Mi dankas. Ĉar mi volas ĝin redoni al mia amikino kiu ĝin pruntedonis al mi... Ŝia kuzino repetis ĝin, ĉar la amikino, de kiu ŝi prunteprenis ĝin, volas redoni ĝin al ĝia posedantino.

Kverelo post drinkado.

Du ebrietaj, eble tute ebriaj, sinjoroj sin apogas sur rando de stardrinkejo. Ekflamas kverelo:

— Mi ne timas vin ambaŭ! diras la unua.

— Ho, diras la alia, mi ja bone vidas, kial vi tiel fanfaronas: tio estas, ĉar vi staras du kontraŭ unu!

La afabla ŝoforo.

La ŝoforo subite emensas: sur la strato, inter la ternajloj de la trapasejo, piediranto haltas, sin turnas ien kaj reen, ekiras, rehaltas, hezitas, — la plej malŝatinda speco de piediranto. Sed la ŝoforo ne estas kolerema; li sin klinas eksteren kaj diras ĝentile:

— Ĉu estus tro scivole, sinjoro, informiĝi pri viaj projektoj?

Ĉe la kombisto.

Sinjoro kun knabeto eniras tre laŭmodan kombejon en Parizo. La helpanto tondas liajn harojn, frizas kaj razas lin, pintigas liajn lipharojn kaj barbon, flegas liajn manojn, masaĝas lian vizaĝon, parfumas lin. Kiam ĉio estas finita, li diras:

— Zorgu pri la etulo! Mi tuj revenos.

Oni prizorgas la etulon, zorgeme parfumas lin, kokete aranĝas liajn harojn, ... kaj oni atendas. Pasas dek minutoj... kvaronhoro... Oni ekmiras.

— Nu, knabo, via patro malfraŭs!

— Li ne estas mia patro, diras la infano. Lin mi renkontis sur la strato; li diris al mi: Nu, bubo, venu kun mi, por ke oni frizu nin senpage!

La angloj malbone prononcas angle.

Petersen estis lingvo-instruisto en mezlernejo. Li estis konvinkita ke li bonege parolas siajn lingvojn. Precipe la anglan li scipovis kiel neniun alia. Nova instruisto, kiu aŭdis pri tio, foje demandis kolegon:

— Tiu Petersen ŝajne estis multe eksterlande?

— Certe, li estis foje en Londono, sed li baldaŭ revenis, pro tio ke la angloj tiel malbonege prononcis.

Bonhumoro sur enkampaj bildfostoj kaj tomboŝtonoj

Tiajn sentencetojn (versojn) tamen oni devas serĉi pleje en la estinteco. En la estanteco oni trovas ne multe da ne-kutimaĵoj; pleje nur ŝablonaĵojn. — Kiu «kribus hodiaŭ por kuracisto sur la tombŝtonon:

Kuracisto kara nia
Jen li kuŝas, viro pia;
Kiujn plensanigis li,
Ankaŭ kuŝas tie ĉi!

Al althonorinda pastro oni surskribis jenan epitafon:

Al pastro Sedulim, en tombo entenita jene,
La dormon Dio donu, al liaj aŭskultintoj oft-
donitan bene.

Al orgenisto en Wiesing:

Jen kuŝas August Martin Mathis,
Krom la orgeno, idojn kaj virinon batis.

Al aktoro:

Jen kuŝas mi, de l' ludo fin',
Publiko ho, aklamu min!

Liberigita edzo tekstigis al sia edzino jenan honorantan version:

Jen kuŝas mia karedzino, dank' al Di',
Dumvive ŝi kverelis nur kun mi.
Migrulo tial kuru for de tie ĉi,
Aŭ ŝi levigos por kvereli tuj kun vi!

lom ofenda povas esti perceptata ankaŭ la verso de maljuna invalido en la Salzburga distrikto:

En tombo jen, trairu hom', la muron baran,
Nun kuŝas ul' kaduka kaj sen fort'.
Eltrinkis li kelkiun ajn «amaran»
Pokalon de la viva sort'!

Eksterordinare malpremata ŝajnas esti tiu edzo:

Edzinon mian kovras ĉi tiu tomba ŝton'
Por ĉia kaj por mia ripozo kaj eĉ bon'!

Por juna viro oni verkis jenan sentenceton:

Jen kuŝas Hans Bovido, kia mir'
Ke ne fariĝis bovo li aŭ bovovir'.
Bovide mortis li junaĝa,
En sekvo de grasiĝo aĉa.

En Göfis en Vorarlberg oni legas sur tombŝtono:

Jen kuŝas Franz X., distriktestro, kiu plene
majstris la italan, francan kaj anglan lin-
gvojn.

En la Alpaj landoj oni iafaje trovas ege naivajn tombsentencojn:

Jen ripozas Peter Mayr, patro kaj buĉisto
de sep infanoj.

Aŭ sur enkampa bildfosto en la vojo al Salthaus:

Ĉi tie mortis Marie Weil, patrino kaj
kudristino de du infanoj.

Bildo, montranta kiel plensarĝita veturilo transveturas virinon, demonstras tiun ĉi akcidenton. Sub « enkampa bildfosto » oni komprenas krucojn aŭ tabulojn kaj bildojn, kiuj estas starigataj sur tiuj lokoj, kie iu mortis sekve de akcidento. Sur tia enkampa bildfosto ni legas:

Per puŝ' de bovoviro venis mia fin',
Kaj pale migris mi al la ĉiela sin'.
Eternan la ripozon trovis tie mi
Per vi, ho bovoviro, vi!

Ankaŭ en la sekvanta enteniga nevolita bonhumoro:

Ĉi tie falegis Jakob Hosenknopf de la
domtegmento en la eternecon.
Suprenrampis, ĉerizojn deŝiris, malsupren-
falis, morta estis.

Do oni vidas, ke ankaŭ tombsurskriboj havas bonhumoron. Kial ne? Ĉu ne Lessing ankaŭ demandigas en « Minna von Barnhelm »: « Ĉu do oni ne povas ankaŭ ridanta esti tre serioza? ».

El « Bäderzeitung », Karlsbad.

Esperantigis B. R. Z.

LA ESPERANTISTA REKLAMO

La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.60 ned. guldenon, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 5 belgaj frankoj aŭ 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organo de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĉifro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĉifro 2044.04 (Bruxelles).**

Naskiĝo. La 20.5.1938 naskiĝis filino Hillegonda Louise Wilhelmina al ges-anoj F.J. Belinfante-Beukers, Bakhuis Rozboomstr. 22, **Leiden, Nederlando.** — Ni kore gratulas.

Geedziĝo. La 18.5. geeedziĝos ges-anoj W. Böttcher kaj L. Reitsma en **Leeuwarden (Nederlando);** estonta adreso: P.C. Hoofstraat 25, Leeuwarden. — Ni kore gratulas!

Klubvesperoj! Por interesaj klubkunvenoj ni petas ĉiujn Esperanto-rondojn sendi al ni ĉiajn literaturajojn, paroladojn, poemojn, anekdotojn, teatraj(et)ojn ktp., spritajn kaj seriozajn. Kompense vi ricevos el ĉiuj la plej bonajn. — G.F.J. Jansen, Schietbaanlaan 105 B, **Rotterdam, Nederlando.**

Kvakerismo kaj Paco. Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, **London N.W. 1, Anglujo.** (432)

Por propagando en ekspozicio! Esperantistoj en la tutmondo, por propagando dum julia foiro en Nancy ni petas sendi poŝtkartojn ilustritajn, poŝtmarkojn kaj diversajn Esperanto-propagandajojn. Respondon garantias: Esperantista Grupo de Nancy, 6, Rue des Michottes, **Nancy, Francujo.**

Esperantan poŝtkarton eldonitan de ĉeĥoslovaka poŝtministerio kaj prospektojn pri Ĉeĥoslovakio vi ricevos por unu internacia respond-kupono de: Esperantista Klubo, **L. Bělohrad, Ĉeĥoslovakio.** (499)

Grupaj funkciuloj aŭ izolite agantoj, kiuj laboras seninterrompe almenaŭ du jarojn por nia movado, devus nepre trovi lokon en la Enciklopedio de Esperanto, por ke ilin la historio ne forgesu. Tio estas la vidpunkto de la redakcio de l' Enciklopedio kaj pro tio ĝi alvokas ĉiujn, kiuj faris la almenaŭ dujaran laboron, postuli la necesan formularon por la biografiaj indikoj. Tiu formularo estas havebla de ĉiuj esperantistaj societoj, lokaj delegitoj kaj libristoj; sed en la okazoj, kiam tiuj ne povas doni, volonte liveras ĝin: Literaturo Mondo, Soroksári-ut 38, **Budapest IX, Hungarujo.** — En Nederlando postuli nur de N.E.C., Schiedamsseweg 209 b, Rotterdam, kaj en Svedujo nur de S.L.E.A., Barnhusgatan 8, Stockholm; en Ĉeĥoslovakio prefere de la asocia librejo.

Gesamideanoj! Ĝstante judino mi devas forlasi hejmlandon kaj geamikojn. Mi estas 28-jara instruistino de junaj infanoj kaj tajlorino, kaj parolas germane, esperante kaj iom france. Mi akceptos iun ajn laboron, ie en la mondo. F-ino Grete Blaustein, Rampers-torffergasse 25/19, **Wien V.**

Leteresperon en julio aranĝas nova grupo kun 9 anoj, kiuj deziras korespondi kun ĉiuj landoj, kaj klopodos respondi al ĉiu skribinto. Leterojn, poŝtkartojn oni sendu al s-ro D. S. Leakey, Slough Social Centre, **Slough (Bucks.)**, Anglujo.

Neŭtrala Esperantista Asocio (prez. Klimsza Emil), **Dolní Suchá 304, Silezio, Ĉeĥoslovakio,** aranĝos grandan Esperanto-ekspozicion en junio; ĝi do kore petas Esperanto-societojn kaj esperantistojn en- kaj eksterlandajn, bonvole sendi senpage por tiu ekspozicio afiŝojn, flugfoliojn, Esperanto-gazetojn, broŝurojn, librojn, libretojn, poŝtkartojn, glumarkojn ktp. Koran dankon anticipe!

Senpage publikigas adresojn de geknaboj, kiuj deziras korespondi, la monata infangazeto « La Vojo ». Adreso Redakcio: Marathonweg 15, II., **Amsterdam, Nederlando.** (453)

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolikismo, senpage povas ricevi ilin de la Internacia Katolika Informejo: Fraterhuis, Vliert, **'s-Hertogenbosch, Nederlando.** (493)

Samideanoj! Helpu nin kaj sendu al ni kooperativan materialon por ekspozicio, kiun ni aranĝos por konvinki la gvidantojn de la kooperativo pri la utilo de Esperanto. Ni rekompencos la senditan materialon. — Kooperativa Esperanto-Grupo, A. Viklund, Box 146, **Skönsberg, Svedujo.**

Filatelistoj! Interŝanĝon de poŝtmarkoj deziras s-ino Fink, 41 Moulaj Joussef, **Casablanca, Maroko,** peco kontraŭ peco, aŭ laŭ mankolisto, katalogo Yvert. Afranku per novaĵoj! (505)

MUUSSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO

La kompleta unua serio (10 volumetoj)
en praktika ujo por guld. 2,50, inkl. sendkostoj

HEROLDO DE ESPERANTO - SCHEVENINGEN (506)

Vendistoj, magazeniŝtoj, kelneroj, kaj similaj!
Londonaj gesamideanoj atendas vian saluton.

Certe vi scias pri la Cseh-metodaj kursoj kiujn f-ino Margareta Saxl nun gvidas kun granda sukceso en Londono ĉe restoracio « Lyons » kaj magazeno « Selfridge ».

La novaj gesamideanoj en tiuj kursoj nun komencas interesiĝi pri nia movado, kaj ili tre estimus salutleterojn aŭ poŝtkartojn de eksterlandaj samprofesiuloj.

Gekelneroj, restoraciistoj, k.s. skribu al: « Esperanto Class », Lyons Oxford House, Oxford Street, London, W.1.

Gevendistoj, magazeniŝtoj, k.s. sendu saluton al « Esperanto Class », Selfridge Ltd., Oxford Street, London, W.1.

Koran antaŭdankon!

Hotelistoj, kuiristoj, bufedistinoj! Ni deziras interrilatojn pri: traduko de fakvortoj, helpo kaj informoj pri fakdemandoj, interesanĝo de receptoj kaj labormanieroj. Ni eldonos liston de gekolegoj, kiun ni sendos kvaronjare laŭ peto. Bonvolu aldoni du poŝtajn respondkuponojn al respondletero kaj precize indiku vian profesion. Sune Kjellander, IEL-delegato, De gamlas väg 7, **Enskede**, Svedlando. (510)

Gekomencantoj (plejparte geinstruistoj), 16-40 jaraj, deziras korespondi. Skribu al: Aimé Van Der Kelen, 71 Leuvenstraat, **Erembodegem** (apud Aalst), Belgujo.

20 gekomencantoj, 16-40 jaraj, deziras korespondi. Skribu multnombre al: Frans Vanderstappen, 108 August de Boeckstraat, **Merchtem (Brabant)**, Belgujo.

Rigardu ĉi tien! 12 danaj gesamideanoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Respondo garantiata. Skribu al s-ro Herluf Westergaard, Skotósmagasinet, **Bórkop**, Danlando.

18 gekomencantoj serĉas gekorespondantojn en la tuta mondo. Bonvolu sendi leterojn al s-ro Raymond Noé, Kerkstraat 27, **Tervuren**, Belgujo.

Juna germana samideano kaj mi mem veturos ĉi-somere tra Aŭstrio kaj Italujo al jugoslavaj marbanlokoj. Trovi geamikojn ĝojigos nin. Karl Vanselow, Winterfeldstr. 26, **Berlin W. 35**, Germanlando.

★ Internacia Semajno

MALO-LES-BAINS (Franclando)

(2a ĝis 10a de Julio)

4a oficiala Perfektiga Kurso de S.F.P.E. Belega instrua kaj libertempa programo. 8-taga restado: 270 fr. frankoj, ĉio entenate (= ĉ. 1 £ 11 ŝ.; 14 guldenoj; 30 svedaj kronoj).

Turisman gvidlibron kaj detalojn petu de S.F.P.E. aŭ: «**Esperanto-DUNKERQUE**», Francl. (509)

S-ro J.M.A. Minderhoud, Pegasusstr. 41, **Haarlem**, Nederlando, deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Li estas 41-jara instruisto en popol-lernejo.

Deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj: Ekaterina Jonĉeva, Ivanka Sedloeva, Kiĉka Mihajlova, Pena Mihova, Elena Janakieva, Ela Angelova, Nisim Kalev, Angel Temelkov. — Adreso de ĉiuj: vilaĝo **Ses-trimo (Pazardĝik)**, Bulgarujo.

Junulo deziras korespondi kun fraŭlinoj en la tuta mondo. Tivadar Ellbogen, Lujza-str. 5. 11.6. **Budapest VIII**, Hungarujo.

20-jara slovena studento volas korespondadi en la Esperanta kaj germana lingvoj pri ĉiuj aktualaj aferoj. — Petkovšek Tone, studento, **Gor. Logatec**, Jugoslavujo.

Mi serĉas gekorespondantojn en nova, nacia Hispanujo aŭ kolonioj. Leteroj aŭ bildkartoj. Se eble, kun oficistoj de komerco aŭ ŝtataj oficejoj. Stefan Wabra, Lauterbachstr. 1866, **Brüx**, Ĉeĥoslovakio.

Kvin partoprenantoj de studrondo deziras korespondi kun plej diversaj landoj. Esperanta Studrondo, Box 22, **Uppsala**, Svedlando.

S-ro W. Lammers, Berkenstraat 20, **Winterswijk**, Nederlando, kaj 4 filatelistoj deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, kvanto kontraŭ kvanto, kun ĉiuj landoj. Skribu multnombre! Ĉiam respondos.

Aleksandro Laquer, notario, bienkomisiisto, parolas germane, slave, france, Esperante, volonte estas je dispono de samideanoj vojaĝontaj Hungarujon. Adreso: Jókai-tér 1, földszint 4, **Budapest VI**.

30 gekomencantoj, 16-35 jaraj, deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Skribu al: Alfons Van Bella, Hauwerstraat 26, **Buggenhout**, Belgujo.

Gekomencantoj, 14-40 jaraj, deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiulandaj. Skribu al: Palmmyre De Cock, Pieter Coeckstraat 2, **Aalst**, Belgujo.

Ĉu vi volas ricevi esperantlingvan tekston de parolado de japana ĉefministro rilate al la ĉina afero? Se jes, skribu al ni, aldonante unu internacian respondkuponon! Societo de Orienta Kulturo, Komagome-Dozaka 228, **Tokio**, Japanujo.

Esperanto-kursoj en Esperantista Libertempejo

Láznê Bêlohrad, Ĉeĥoslovakio

(10 Julio ĝis 24 Julio 1938)

Kurso por progresintoj. — Seminario por Cseh-metodaj instruistoj. — 14-taga restado kun kurskotizo nur 600.— Kĉ. (= 37.— nederlandaj guldenoj) — Detala propekto senpage de

Esperantista Klubo, L. Bêlohrad, Ĉeĥoslovakio.

(498)

Nur 30 cendojn, inkluzive de sendkostoj, kostas la interesa rakonto de Friedrich Gerstácker: « La ŝipĉarpentisto ». Gerstácker estas la plej konata germana aŭtoro de aventurplenaj vojaĝaj rakontoj. « La ŝipĉarpentisto » havas kiel scenejon la Pacifikan Oceanon. La traduko estas bona. Ĉiu legos ĝin kun streĉa intereso. Hispana samideano J. Comella desegnis la titolbildo. Mendu ĉe la Libroservo de Heroldo, aŭ ĉe iu alia vendisto de Esperanto-libroj. (508)

Bachrich Eduard, Poŝtfako 25, **Zemun**, Jugoslavujo, deziras korespondi kun geskoltoj ĉiulandaj.

Komencantoj deziras korespondi kun samideanoj ĉiulandaj. — Esperanto-Klubo, Hokowhitu School, **Palmerston North**, Nova Zelando.

Ĉeĥoslovakaj samideanoj volas korespondadi kun fremdaj samideanoj, ankaŭ kun tiuj kiuj vizitos nunjare la Sokolan Olimpiadon en Praha. Skribu tuj al: S-ino Marie Hermanská, Kabeláčova 421, **Ném. Brod**, Ĉeĥoslovakio.

Juna poeto deziras korespondi serioze aŭ gaje pri ĉio kun ĉiuj landoj. Henriko Cerny, V Uhlu 638, **Praha-Michle**, Ĉeĥoslovakio.

Tri svedoj, kiuj lernis Esperanton dum du studsezonoj, deziras korespondi kun samideanoj en aliaj landoj. La adresoj estas: S-ino Margit Adolfsson, Torstorp 618, **Finspång**, Svedlando; S-ro Sven Lundholm, Torstorp 628, **Finspång**, Svedlando; S-ro Harry Karlsson, Torstorp, **Finspång**, Svedlando.

15 gekomencantoj serĉas gekorespondantojn en la tuta mondo. Bonvolu sendi la leterojn al s-ro P. Dehaes, Gemeentehuis, **Erbs-Kwerps**, Belgujo.

Inteligenta kaj eleganta fraŭlino, 35-jara, bankoficistino, deziras korespondi kun sinjoroj de iu ajn angulo de la mondo. Milada Poláková, Čelakovského ul. 623, **Hradec Králové**, Ĉeĥoslovakio.

Kvar amikoj volas interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj, 50 kontraŭ 50 pecoj, aŭ laŭ mankliso. Skribu al s-ro W. Lammers, Berkenstraat 20, **Winterswijk**, Nederlando. — Respondos ĉiam.

Du junaj, viglaj, inteligentaj danoj deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo. Respondo garantiata. — S-ro Niels Hviid, **Pindstrup**; kaj S-ro Herm. Serup, Mygind, **Randers**, Danio.

Mi deziras korespondi kaj interŝanĝi leterojn, poŝtkartojn ilustritajn, poŝtmarkojn, kun ĉiuj landoj. Mi ĉiam respondos tuj. S-ro Francisko Klimt, **Brněnec 25**, Ĉeĥoslovakujo.

21-jara fraŭlino deziras korespondi kun la tuta mondo pri diversaj temoj. Irma Pletichová, Havlíčkova 8, **Praha X**, Ĉeĥoslovakio

Esperanto-Faksekcio Tipografista « Progreso » fondiĝis en Beograd. La sekcio apartenas al Kleriga Komitato de Unuiĝa Organizacio de Jugoslavia Tipograf-laborista Unuiĝo, Beograd. Oni petas regulan alsendon de modelaj tipografaj ellaborajoj kaj adresoj de tiuj samfakanoj, kiuj povos daŭre resti en korespond-rilatoj. Valoraĵoj rekompencotaj. Represo de ĉi tiu informo, en intereso de pli vasta ekuzo de Esperanto kaj ĝia enradikiĝo, dezirata. — Adreso por fakaferoj: E.F.T. « Progreso », Luj Bartua, 3/et.2 (SO-SGRJ), **Beograd**, Jugoslavio.

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S Antverpeno — Belgujo.

